HUNGARA VIVO

2

1974

8,— Ft

ÜGP

MALPEZA
VANDO
PANELO

La panelo ÜGP estas etaĝon alta, interna vando-elemento de 6 centimetra dikeco, kies esenca materio estas gips-perlito.

La muntado de vando el ÜGR-panelo estas simpla, rapida, tre produktíva, la konstruada malsekeco estas malpliigebla je minimumo.

Panelo ÜGP estas fabrikata de Heves megyei Tanácsi Építőipari Vállalat (Konsilantara Konstru-entrepreno de departemento Heves)

H—3301 Eger, Klapka Gy. u. 11. Rf. 7.

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368. Budapest, Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XIV. jaro, 1974. 2-a numero

Numero pri Hungario kiel inda turisma celo

ENHAVO

V. Benczik: Turismo en Hungarlando 1
Nova vivo sur la hungara stepo 2
Szolnok, urbo de la Hungarlanda Esperanto-Kongreso 4
L. Kökény: Vintra vojaĝo 6
E. Pallós: Esperanto kaj turismo 8
Du hungaraj popolbaladoj 9
Péter Rados: Ekskurso al la Belarta Muzeo 10
La stulta junulo 11
G. Magyari: Subteraj mirakloj de la naturo 12
P. Balkányi: La naci-malplimultoj en Hungarlando 14
J. Szekeres: Panoramo 16
D-ro J. Mátéffy: Paŭlo Balkányi jubileas 18
Károly Kiss: Interparolo kun Gy. Ortutay pri la hungaraj folklor-esploroj 19
Ekzameno sen risko 20
D-ro I. Szerdahelyi: Esperanto en la spegulo de la moderna lingvoscienco 21
D-ro F. László: Balatono, nia granda trezoro 22
L. Tárkony: Revuo de Revuoj 24
F. Karinthy: Mahlzeit kaj Zaturek 25
Grekoj en Hungarlando 25
Ada Csiszár: Ekstere — sur la strato 26
István Örkény: Ĉu estas arboj en Venecio? 27
György Moldova: Miaj unuaj ludiloj 28
Lajos H. Barta: Historietoj kaj historio 29
Korespondi deziras 30
Humuro 30
FERI: Por turistoj — krucvortenigmo 31

Sur la titolpaĝo: *Sárospatak*
(Foto de János Eifert)

Turismo en Hungarlando

Kvankam la amasa turismo estas fenomeno nur de la pasintaj du jardekoj, la turismo mem estas praa afero. La homo ĉiam sopiris koni regionojn, pejzaĝojn kaj ne laste homojn fremdajn, sed antaŭ jarcentoj la primitiva trafiktekniko ebligis nur al malmultaj — al la plej kuraĝaj — fari grandajn vojaĝojn kaj kontentigi sian scivolon. Oni ne povas kontesti, ke ekzistas ia simileco inter la motivoj de la iamaj mondvojaĝantoj — inter ili ne malmultaj hungaroj — kaj tiuj de la nunepoke jare ekvojaĝantaj dekmilionoj. Do, kun iom da ĵurnalisma vulgarigo oni povus diri, ke unu el la plej famaj turistoj de la Mezepoko estis Marco Polo . . .

KIO ESTAS TURISMO?

Nu, sed ni lasu la ŝercon, kaj por eviti miskomprenojn ni provu difini, kion oni komprenu sub la nocio „turismo". Mi konceptus jene: turismo estas memvola vojaĝo de relative signifa ono de la loĝantaro de iu lando al alia, kun la celo ripozi kaj kreskigi siajn ĝeneralajn (ne fakajn!) konojn. Laŭ tio, vera turismo komenciĝis nur en nia jarcento, ja la pli frua vojaĝado de la monduma aristokrataro de la Eŭropaj landoj ne kontentigis la postulon pri „signifa ono", kaj la panserĉa pilgrimado de la malriĉuloj de meza Eŭropo al Usono kaj la „vojaĝado" de la diversnaciaj soldataroj dum la militoj ne povas esti konsiderata kiel „memvola".

PRAHISTORIO DE LA HUNGARA TURISMO

Do, pri nur iom signifa turismo, almenaŭ en Hungarlando, oni povas paroli nur ekde la komenco de tiu ĉi jarcento, kiam ne nur kelkdeko da aristokratoj, sed ankaŭ certa parto de la meza burĝaro jam povis permesi al si la lukson foje-foje vojaĝi al eksterlando. La plej frekventata celo de la „ekturismanta" hungara burĝaro — krom Aŭstrio, kun kiu Hungarlando ĝis la unua mondmilito formis komunan monarĥion — estis Franclando, unuavice Parizo, kaj nur malmulte postrestis al ĝi Italio. Estas strange, tamen kompreneble, ke tiutempe la turisma bilanco de Hungario estis ege negativa: vojaĝis al eksterlando jare ĝis dekmil hungaroj, dum la nombro de eksterlandanoj, kiuj vizitis nian landon, kalkuliĝis nur en centoj. En la lando mankis preskaŭ ĉio necesa por inde akcepti eksterlandanojn, do ne mirinde, se la monhava burĝaro de Eŭropo preferis la samajn landojn, kiel la hungaroj monhavaj.

Inter la du mondmilitoj la situacio ne multe boniĝis. Kvankam oni konstruis sufiĉe multajn hotelojn, kiuj taŭgis por akcepti eksterlandanojn, kaj eĉ, la tiutempa registaro faris fortostreĉojn por kreskigi la turismon, la afero ne multe progresis, kaj la nombro de la gastoj, kiuj venis al la lando, ege postrestis al la nombro de la turistoj, ricevitaj de aliaj landoj. Tion kaŭzis unuavice la politiko de la tiutempa registaro, kiu rilatis malamike al ĉiuj najbaraj landoj — kiuj ja ĉiam estas la ĉefa fonto de la turismo —, krome ankaŭ al la landoj de la entento. Kaj ankaŭ la cirkonstancoj de la tiutempa Eŭropo malfavoris la disvolviĝon de la turismo: la ekonomian mondkrizon sekvis la faŝisma periodo, kiun „kronis" sesjara mondmilito . . .

POSTMILITA EVOLUO

En 1945 Eŭropo kuŝis en ruinoj, kaj la homoj nek povis, nek volis vojaĝi: pro militaj kialoj milionoj devis forlasi sian landon, sekve ilia plej arda deziro estis reveni, revidi siajn familianojn kaj ne vojaĝi plu . . . Ankoraŭ daŭris la postmilita rekonstruo, kiam lanĉiĝis la

Nova vivo sur la hungara stepo



Paradizo de fiŝkaptistoj ĉe Hortobágy-a ponto

La hungara tero estas transkontinenta landvojo ne nur por la fremdultrafiko, sed la saman rolon ĝi ludas ankaŭ por granda kaj varia amaso de sovaĝbirdoj migrantaj aŭtune de nordo al sudo por travivi la mornajn vintrajn tagojn en pli mildaj varmaj regionoj. Speciale frekventata transirvojo por la birdomondo estas *Hortobágy,* la hungara *Granda Ebenaĵo* situanta en la orienta landparto, trans la rivero Tisza (Tibisko).

Hortobágy fariĝas ĉiujare kvazaŭ hotelo por la flugilhavaj gastoj, kiuj parte restas ĉe ni dum la tuta vintro, parte elektas Hungarlandon nur kiel ripozejon por refreŝiĝante povi daŭrigi la longan vojaĝon al la sunbrilaj sudaj landoj. Ankaŭ en la lasta sezono amase alvenis de antaŭ la norda vintro la kamparaj agloj, la buteoj, la migrantaj falkoj, cirkuoj. Sed vizitis nin ankaŭ la etaj kantbirdoj de la nordaj tundroj, la hortulanoj, la flavbekaj kanabenoj, kaj proksime al la kolzokampoj kungrupiĝis la otidoj.

Tiu sezona riĉeco de la faŭno sur la Granda Ebenaĵo jam frue alvokis la atenton de la homoj pri tiu ĉi ĉasista paradizo. Sed la ĉiujaraj regulaj ĉasadoj, se ne paroli pri la ŝtelĉasantaj birdomurdistoj, havis en la lastaj jardekoj tristan rezulton, nome plenan neniigon aŭ almenaŭ endanĝerigon de certaj birdospecoj. La plej granda hungara birdospeco,

---

malvarma milito, kaj la atmosfero de la suspektemo, malamikemo multe malfavoris la evoluon de la turismo, kies bazo ja estas la internacia amikeco. Tamen, la amasa turismo havas siajn ĝermojn en tiu periodo, per la vizitoj de la scivolaj kaj relative riĉiĝintaj usonanoj al la fora Eŭropo . . .

1973 — 7 MILIONOJ DA TURISTOJ!

La hungara turismo komenciĝis fine de la kvindekaj jaroj, kaj ĝin karakterizas tre rapida kresko. Montriĝis, ke la lando vekis la atenton de la ĉiam pliiĝanta amaso de vojaĝantaj eŭropanoj, kaj en 1965 nia lando jam akceptis 1.366.300 eksterlandanojn. Ĝi estas tre grava nombro, se ni konsideras, ke dek jarojn antaŭ tiu dato turismo praktike ne ekzistis. Sed la kresko ne haltis, kaj en 1973 vizitis Hungarlandon jam entute 7 milionoj da eksterlandanoj! Rekorda cifero, tamen, ni ne povas esti kontentaj, ja la plimulto de ili nur travojaĝas la landon kaj pasigas ĉi tie entute 2—3 tagojn.

Plej multaj turistoj daŭre vizitas nian landon el Ĉeĥoslovakio: en 1972 entute 2,6 milionoj da personoj! Poste sekvas Jugoslavio kun 767 mil kaj Pollando kun 684 mil turistoj, sed eĉ el la fora Usono ni povis akcepti 69 mil turistojn. Tiuj ciferoj kompreneble ankoraŭ ne kompareblas al la vizitateco de la grandaj turismaj landoj de Eŭropo, ja Hispanio havas jare ĉ. 22 milionojn da vizitantoj, Francio 13, kaj Italio 12, tamen, la hungara turismo iras la ĝustan vojon. Certe, restas ankoraŭ multo farenda: unuavice oni devas investi multan monon por kreskigi la nombron de la hotelaj litoj. (En 1960 la lando havis



Tagmeza ripozo en Hortobágy — Foto de János Eifert

tiu de la otidoj, estas jam preskaŭ malaperonta. Simile rapide malkreskas la nombro de niaj grandaj rabobirdoj. Kaj sisteme ekstermas la etajn kantbirdojn tiuj, kiuj misuzas la eblon, ke oni povas akiri kaj libere uzi la pneŭmatikan karabenon, tiun damaĝfaran pafilon. Ĉu kredeblas, ke la homo definitive ekstermis en la lastaj jardekoj tutmonde 72 mambesto- kaj 130 birdospecojn.

Nu, en la pasinta jaro okazis granda ŝanĝo sur la hungara ebenaĵo. Baze de la leĝo pri naturdefendo, oni decidis formi *Nacian Parkon,* kun amplekso de pli ol kvindek mil hektaroj, sur la stepo Hortobágy. Grava ĉapitro de tiu leĝo disponas pri la plibonigo de l' vivcirkonstancoj de la birdomondo. Sekve de tiu leĝo la ĉasado sur la teritorio de la Nacia Parko en la pasinta sezono estis jam malpermesita. Ankaŭ plue regos armistico sur la stepo por certigi la trankvilan pacon de nia plej granda birdkolektiĝejo kaj travintrejo.

Ĝis nun la aŭtunaj pafilkrakadoj dise sur Hortobágy damaĝis ne tiom per la alta nombro de la mortigitaj sovaĝbirdoj, sed prefere per tio, ke ili embarasis la trankvilon de tiuj birdoj, kiuj post longa migrado serĉis ĉe ni ripozon.

De nun la internacia birdmondo povas ĝui plenan sekurecon sur la hungara stepo. Tio estas ja Eŭropa scienca intereso kaj ni klopodas plenumi la devojn, kiujn preskribis por ni ankaŭ la decidoj faritaj en la konferenco de Internacia Buroo pri Akvobirdesplorado en Leningrad (1969).

Cetere, la defendo de la minacata faŭno estas organika parto de ĉirkaŭaĵprotekto, kiu lasta estiĝis jam unu el la ĉefaj problemoj de nia epoko. Ĝuste pro tio ni ĝojas pri la nova paŝo, ĉar la malapero de la birdmondo ne nur senkolorigus nian vivon, sed per renverso de la biologia ekvilibro ĝi provokus novajn malutilojn de la homa ĉirkaŭaĵo.

—y

---

15 mil hotelajn litojn, en 1972 — 32 mil. Tiuj ciferoj ne enhavas la nombron de la lueblaj privataj ĉambroj.)

HUNGAROJ AL EKSTERLANDO

Paralele kun la kresko de la gastoj, vizitantaj Hungarion, konstante pliiĝis ankaŭ la nombro de hungaroj, kiuj vojaĝis al eksterlando. En 1965 vojaĝis al eksterlando 892.900 hungaroj, en 1972 — 1.366.300, kaj pro la pasportaj faciligoj la jaro 1973 certe alportis gravan kreskon. La plimulto kompreneble vojaĝis al socialismaj landoj, unuavice al Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj Bulgario, sed, kalkuliĝas per dekmiloj ankaŭ la nombro de tiuj, kiuj vizitas Italion, Francion, Aŭstrion ktp. Inter ili ĉiam pli grandnombre troviĝas hungaraj esperantistoj, ja la esperantistaro ankaŭ en nia lando estas pli vojaĝema ol ĝiaj aliaj samlandanoj . . .

ESPERANTISTAJ ARANĜOJ EN HUNGARLANDO

Kompreneble, la hungara esperantistaro, por ekkoni aliajn landojn, deziras ankaŭ prezenti la sian al la eksterlandaj esperantistoj. La plej granda esperantista aranĝo dum la lasta jardeko estis la 51-a Universala Kongreso en 1966 kun 4.000 partoprenantoj. Tiu UK tamen ne estis la sola eblo fari esperantistan vojaĝon al Hungarlando: la hungaraj esperantistoj ĉiujare organizas plurajn aranĝojn. Jen kelkaj el la planitaj por 1974: Landa Esperanto-Kongreso en *Szolnok* en junio, Somera Esperanto Universitato en *Gyula* en julio kaj la 4-a Vintra Esperantista Ferio fine de decembro en *Budapeŝto.* Bonvenon al ĉiuj gastoj!

V. Benczik

Szolnok, urbo de la Hungarlanda Esperanto-kongreso

La urbo Szolnok estas pramalnova loĝkolonio situanta ĉe kruciĝo de vojoj kaj akvovojoj. Laŭ arkeologiaj trovaĵoj jam en la glaciepoko kaj en la neolitiko loĝis homoj en ĝia ĉirkaŭaĵo.

Ĝia nomo estas menciita unue en 1046. Reĝo Stefano I., dividante la landon en departementojn, nomis laŭ Szolnok grandan departementon, etendiĝantan de la rivero Tisza (Tiso, Tibisko) ĝis en Transilvanio.

La urbo multe suferis dum la jarcentoj. Ĉe la mongola-tatara invado ĝi tute ruiniĝis; reĝo Béla IV. enloĝigis tie novajn koloniulojn. Dum la turka okupado la urbon trairis ĉiu plago veninta ĉu de oriento, ĉu de okcidento.

Grava komerca centro faris ĝin ekde la 12-a jarcento la sal-portado kaj la flosado. En 1550 oni konstruis ĉirkaŭ ĝi fortikaĵon, sed post du jaroj ĝin la turkoj okupis, kaj konstruis tie minareton kaj banejojn, eĉ ponton super Tisza. Dum mallonga tempo en ĝi regis Imre Thököly, poste la armeo de generalo Mercy reokupis gin (1685), sed la turkoj forbruligis ĉion kaj la imperiestra armeo konkeris nur fumantajn ruinojn.

La urbo restariĝis el la ruinoj, sed devis trasuferi reajn plagojn: incendion (1739), malsatmizeron kaj pestepidemion (1743). Pro la pesto mortis 480 personoj el la 1500 loĝantoj.

En 1835 komenciĝis la vaporŝipado sur Tisza. Tio, kune kun la reguligo de la rivero ekprosperigis la urbon komerce kaj agrikulture. Grava faktoro estis la fervojo, malfermita en 1847. La tiamaj stacidomo kaj hejtisto-domo ankoraŭ nun staras kaj estas rigardindaj kiel industrio-historiaj monumentoj.

En la jaro 1876 Szolnok, havanta jam laborejon por la Ŝtatfervojoj, brikfabrikojn, muelejojn, fariĝis denove departementa rezidejo. Kaj ĝi ricevis pli kaj pli karakteron de vera urbo (akvodistribuo, elektra centralo, vaporbanejo, trotuaroj, ŝoseoj).

Multe suferis la urbo ree en 1919. Dum la Konsilia Respubliko ĝi estis front-urbo 77 tagojn. Ĉe la liberiĝo en 1944 ankoraŭ pli damaĝis la milito la urbon: kelkaj ĝiaj partoj tute pereis. En la momento de la liberiĝo ĝi havis nur ĉ. 4000 loĝantojn.

Ĉu hodiaŭ? La urbo kaj regiono apartenas ekonomie kaj kulture al la plej rapide evoluantaj regionoj de la lando. Szolnok estas centro de la olea mineksplu atado sur la Ebenaĵo, kaj post kelkaj jaroj ĝi estos centro de la hungara kemia industrio. Post Budapest ĝi estas eble la plej grava fervoja nodo de la lando. Tra Szolnok pasas la internaciaj trajnoj al Sovetunio kaj Rumanio, tra la urbo kondukas la ĉefa ŝoseo (la „4"-a), unu el la plej trafikplenaj ŝoseoj de la lando, ĉi tie oni aranĝas plej

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo nutraĵpavilono
EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono
EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo
EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo



UTASELLÁTÓ

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno, Budapest, V., Veres Pálné u. 24. Telefon: 189-900/160

Nova centro de Szolnok

grandan parton de la vartrafiko de la ŝipveturado sur Tibisko.

Szolnok havas grandurban karakteron, modernan vizaĝon. Ĝiaj larĝaj, grandaj parkoj, florriĉaj boskoj, la du bordoj de Tibisko memorigas pri refreŝiga aŭ baneja urbo. Estas kompreneble, ke post tiom da detruoj kaj detruiĝoj en Szolnok ne povis postresti valoraj artaĵoj. Tamen kelkaj el ĝiaj publikaj konstruaĵoj kaj institucioj meritas atenton. Sur la placo Kossuth staras *la Muzeo Damjanich, kiu ricevis sian nomon pri heroa generalo de la revolucia libermilito en 1848—1849, János Damjanich. La Muzeo gardas interesan arkeologian, historian kaj popolartan materialon.* Ĉe ponto de la rivero Zagyva modestas la *Artista Kolonio* — kvankam ĝi povus verdire ankaŭ fieradi. Ĝi estis komence de nia jarcento akropolo de la hungara pentroarto. La kolonion fondis August von Pettenkofen pentristo el Vieno. Li malkovris la pitoreskon de la multkoloraj, movriĉaj vendoplacoj de la apudtibiska eturbo, kaj por jardekoj li ligis sian arton al Szolnok. Ĉi tie studadis aŭ laboradis multaj hungaraj artistoj de la dua duono de la XIX. kaj de la unuaj jardekoj de la XX-a centjaroj. Tiel venis la penso, ke oni faru artistan kolonion en la urbo havanta kvin-jardekan pentristan paseon. En j. 1899 pentristoj *Adolf Fényes, Károly Kernstok, László Mednyánszky, János Vaszary* petis permeson por loksidiĝi en Szolnok. La unuan Artistan Kolonion de la Ebeno oni inaŭguris en 1902.

Najbare al la Artista Kolonio staras la plej malnova artmemoraĵo de la urbo: la klasikstila Fortikaĵ-preĝejo. Grava artmemoraĵo estas ankaŭ la baroka Franciskana preĝejo sur la Tisza-bordo; ĝi konstruiĝis en la XVIII-a jarcento. Proksime al la preĝejo situas la *„Szolnoka Galerio":* moderna ekspoziciejo, kiun oni malfermis en 1972.

Sur la bordo de Tibisko situas Hotelo Tisza, kaj Banejo Tisza. Eŭrop-fama estas la 56 Celsius-grada sanigbanejo. El pli ol 900-metra profundo ŝprucas la akvo de la saniga fonto.

Sur alia bordo de rivero Tibisko situas Tiszaliget (Tiszabosko), jam nun konsiderinda baneja kaj refreŝiga kolonio. Oni konstruis basenojn kaj restoraciojn por miloj da personoj. En la banejo (kiu havas sanigan akvon) troviĝas ankaŭ saŭno. De jaroj funkcias la moderna kampadejo por 500 personoj.

Proksimiĝas 900-jara datreveno de la Grandebena urbo Szolnok. *En 1975 la urbo estos 900-jara.* Mem la jubileaj okazintaĵoj estos aranĝitaj dum 1. I. 1975. —20. VIII. 1975. La urba Konsilantaro starigos meritan monumenton memore de la datreveno. En 1975 estos malfermita la nova Stacidomo, la plej moderna en Mezeŭropo. Samjare estiĝos la nova centro de la urbo. Oni konstruas novajn hotelojn, vendejojn, kvartalojn. En Tiszaliget konstruiĝas pionira stadiono, sporthalo, turisma hotelo.

En la urbo malaperas la malnovaj, aĉaj, mallarĝaj stratoj, kaj sur ties lokoj altiĝas modernaj, imponaj konstruaĵoj. Post nelonga tempo urbo Szolnok iĝos vere grandurbo. Bonvolu ĝin viziti!

VINTRA VOJAĜO

Dum du festotagoj ni vojaĝis per „Panorama"-aŭtobuso tra nordorienta Transdanubio. Frumatene mia edzino kaj mi, kun 36 vojaĝkunuloj, nin anoncis ĉe la ĉarma administrantino *Perlo;* ŝi prezentis nin al la gvidanto Ĉiĉerono kaj al la ŝoforo. La buso baldaŭ startis.

Ĉiĉerono bone nin amuzis dum la vojo: citis poemojn, rakontis vari-voĉe ĉ. 150 anekdotojn aŭ ŝercojn.

Ni eliris el la buso unue en la pitoreska urbo *Szentendre,* sur la bordo de Danubo. Sur ŝtuparo ni iris al la baroka ortodoksa preĝejo, rigardadis plezure. Verŝajne ĉiu el ni vagadis jam en la urbeto, sed nun ĉiu decidis veni ĉi tien denove almenaŭ por ok horoj.

La buso ree ekiris norden laŭ la Danuba bordo ĝis *Visegrád;* tie ĝi haltis nur por 20 minutoj. Jen ni estas ĉe pentrinda punkto, ĉe la trarompo de la riverego. Nun ni ne havas tempon rigardi la tre ampleksan elfositan teritorion kun mezepokaj kaj renesancaj spuroj de florado kaj kun la restaĵoj de la palaco de reĝo Matiaso: la buso senindulge portas nin plu.

Danubo, skribinte grandan U literon, denove rektiĝas, poste iom kliniĝas, kaj ni atingas la iaman rezidejurbon de Hungario: *Esztergom.* Ni tuj eniris en la novklasikan Bazilikon, plej grandan preĝejon de Hungario, kiu pretiĝis en 1869. La plej rigardinda parto estas la kapelo Bakócz el 1511. Kiam oni ekkonstruis la nunan Bazilikon, en 1820, la kapelon oni dismetis je 1600 numeritaj arkitektaj elementoj, kaj tiel oni konstruis ilin en la korpon de la Baziliko. Proksime staras la elfosita fortikaĵkapelo kaj restaĵoj de la mezepoka reĝa palaco. Poste ni salutis la instruistan seminarion, kie instruas Esperanton kolegino Éva Tófalvi kaj kolego János Prunkl.

Nun niaj pensoj flugis unue al la romia imperiestro Marcus Aurelius, aŭtoro de libroj de la „Meditadoj", ĉi tie verkitaj. Post tri minutoj ni vidis la statuon de nia granda poeto Bálint Balassi, kiu falis ĉi tie en batalo kontraŭ la turkoj. Niaj sentoj poste flugis al la monto Előhegy, al nia poeto Mihály Babits, kiu havis ĉi tie somerumejon (nun muzeo), kaj mi ree sentas lian jam malfortan manpremon donitan iam en la ĉefurba Esperanto-Societo.

Nun ek al *Győr,* la tempo nin urĝas. Nin alvenis posttagmeze en la „urbon de kvar riveroj", al ekonomia, trafika kaj kultura centro de norda parto de Transdanubio. Kio plaĉis pleje en la urbo? En tuja proksimeco al la stacidomo staras la grandmezura, ornama Urbodomo kun 58 m. alta turo. Sur monteto estas la katedralo, kie en aparta kapelo estas oraĵista artaĵo el la mezepoko: la „herma" kaprelikvujo de reĝo László. Ni vidis iom pli bone la stratojn montrantajn barokan urbobildon. Ekz. la Napoleon-domon, kie loĝis la imperiestro post la batalo en 1809. Ni admiris belegan barokan domon, kie nun estas la Muzeo János Xantus.

Abatejo de Pannonhalma

Ni vespermanĝis en la hotelo kaj post la dormo ni matenmanĝis. La manĝajoj por multaj estis ĉiam pli ol sufiĉaj!

Sed nia buso jam estis ekironta kaj post 18 km-a bus-vojaĝo ni jam vidis en la nebulo la siluetojn de la imponega *Pannonhalma.*

Bedaŭrinde mi fartis malbone pro la tro forta hejtado en la hotelo, do mi ne iris kun la grupo por la vizitado, sed promenis en la parko. Krome mi atente tralegis la tutpaĝan artikolon (24. dec.) de Péter Ruffy, eminenta ĉefkunlaboranto de Magyar Nemzet.

Ruffy restadis ĉi tie, kiam „la neĝo estis tiel densa, kiel tiu imagita kurteno, kiu kovras de antaŭ ni la solvon de la Anonymus-enigmo". Inter la muregoj fermite troviĝas la plej granda Benediktana Biblioteko de la mondo, entute 300 mil volumojn havanta kolektaĵo. La unua hungara lingvomemoraĵo ja estas la fondo-dokumento de la Abatejo Tihany el 1055, kaj tiun oni gardas ĉi tie.

La unua historio de la hungaroj estas la libro „Gesta Hungarorum", kiun verkis Anonymus la „sennoma" notario de reĝo Béla, sed ĉar la hunga-

roj en la mezepoko havis kvar reĝojn kun tiu nomo, la malkovra agado eĉ nun daŭradas.

Niaj vojaĝkunuloj revenis kaj estis ravegitaj de la viditaĵoj. Do ni babiladis iomete.

— Ĉu ni kredu, ke Karlo la Granda en 800 konstruigis ĉi tie preĝejegon? — demandis parolema virino.

— Kredu, kara, ke abatejo estis fondita nur en 996. La plej malnova preĝejo ruiniĝis, kaj poste la ĉefabatejan preĝejon, riĉan je romanikaj kaj gotikaj detaloj, oni konstruis en 1255.

— Mi dankas la klarigojn, sed mi ne tro kredas pri la jaroj. Mi legis en kvar libroj iom pri Pannonhalma, sed kelkaj jaroj diverĝas.

— Do kio plej plaĉis al vi? — mi turnis min al grizhara, tamen juna virino.

— La klaŭstro — kiun hungare oni nomas „kerengő", la Nova Turo 50 metrojn alta, de kies ornampordego tra koridoro ni enpaŝis en la nunan Bazilikon, tre gravan eklezian artmemoraĵon. La Bibliotekego — kie mi vidis la Biblion en Esperanto —, la arkeologia kolektaĵo, la multaj pentraĵoj...

— Mi bone scias — diris pedagogo —, ke la gimnazianoj ricevas solidan instruon ĉi tie ĉe la benediktanoj, ankaŭ pri natursciencoj kaj sociologio. La pedagogoj kaj lernantoj ne vivas ekster nia socio.

Nun ni adiaŭis kaj nia buso iris plu, al *Zirc*. Ĉi tiu urbo kun siaj historiaj rilatoj, kulturaj institucioj, artobjektoj, arboreto, rare bela pejzaĝo estas tre altira. Nia reĝo Béla la 3-a en 1184, havante familiajn kontaktojn kun la franca reĝo, fondis ĉi tie cistercianan abatejon. De tiam ruiniĝis preskaŭ ĉio. La nun videblan grandmezuran, barokan preĝejon oni konstruis en 1732—52. — En la domego de la estinta abatejo estas hejmo de scienca biblioteko kaj muzeo „Antal Reguly". Kodeksoj, prapresaĵoj, lokhistoriaj kaj etnografiaj trovaĵoj...

La lasta stacio de nia vojaĝo estis la „ĉefurbo" de la montaro Bakony: *Veszprém*. La plankarto de la urbo, situanta sur kvin montetoj kaj en la valoj inter la montetoj, estas sufiĉe komplika. La stratoj plektiĝantaj unu al la alia kurbiĝadas ne nur en flanka direkto, sed ondadas ankaŭ supren-malsupren. — Sed ni ne vidis multe. Jam estis mallumo kaj pluvis. Tamen ni marŝis al la fortikaĵo, rapidis tra la strato Tolbuĥin: sur ambaŭ flankoj viciĝas ĉefe barokaj loĝodomoj kaj publikaj konstruaĵoj. Ĉi tie estas la episkopa palaco, la katedralo. La strato gvidas ĝis la norda rando, kie sur kruta muro staras la statuoj de la unua hungara reĝo, de lia edzino kaj filo.

Ĉi tie ni pli sentis la vintran venton. Ni do reiris rapide, kaj sidiĝis en nia agrable hejtita bus-hejmo. Antaŭ ol la buso ekiris, anime ni salutis la ĉi tie loĝantajn karajn geedzojn Eva kaj Bernard. Poste, veturante tra Székesfehérvár, ankaŭ ĉi tie ni korege salutis sammaniere du aliajn esperantistajn geedzojn: Jutka kaj Tibor, Felicja kaj László, krome k-don Jozefo Nagy. Kaj je la 19-a ĉiu alvenis en Budapeŝto en sano kaj en ordo.

L. KÖKÉNY



Nova kvartalo de Győr

Strato en Szentendre



Esperanto kaj turismo

Ofte aperas informoj pri la „migranta mondo". Laŭ la statistikoj preskaŭ ducent milionoj da homoj jare forlasas sian hejmon por vojaĝi eksterlanden. La turismo nuntempe estas mondfenomeno, kiu disvolviĝas kiel reala socia pretendo. La moderna tekniko, la ĝenerala altiĝo de la vivnivelo plifaciligas la vojaĝadon. Turismaj oficejoj, agentejoj amase disdonadas varbilojn por societaj vojaĝoj en ĉiu sezono. Tamen la plimulton de la turistoj ne kontentigas la grupaj vizitoj ĉe interesaj vidindaĵoj, ili deziras ankaŭ individue vagadi en fremdaj lokoj kaj interkonatiĝi kun la loĝantaro. Sed kiel interkompreniĝi sen komuna lingvo?!

La bezono de la Internacia Lingvo akre sentiĝas en la turismo. La nekompreno de la nacia lingvo en la vizitata lando ofte kaŭzas malagrablaĵojn eĉ humiligon por la ferianto.

Antaŭ jaroj rekoninte la nesufiĉe takseblajn avantaĝojn de la Internacia Lingvo en turismaj terenoj, plurflanke en la Esperanto-movado eksonis la propono: „Esperanton en la turismon"! La alvoko renkontis favoran eĥon de la tutmonda esperantistaro. En 1970 fondiĝis en Vieno la faka asocio MONDA TURISMO aliĝinta al UEA en 1973. La ĉiam pli populara turisma tereno por Esperanto estis neglektata ĝis tiu tempo, kvankam tie ni povas ja atingi rezultojn per minimumo da laboro kaj elspezoj. Tiu ĉi organizaĵo esperantista, kiu fiere portas la nomon „Monda Turismo" volas esti baldaŭ konata kaj populara. La asocio subskribis jam kontraktojn por konkreta kunlaboro kun HEA kaj PEA.

Laŭ sia statuto MONDA TURISMO havas individuajn kaj asociajn membrojn. La tasko de ĉiu membro estas subteni la disvastigon de Esperanto en la turismo, gardi ĝian unuecon kaj aŭtoritaton. La asocio havas landajn sekciojn (tiuj estas la turismaj komisionoj de la landaj asocioj), kiuj nomas unu el siaj membroj esti reprezentanto en la Asocio Monda Turismo. Ĝia gvidorgano estas la Ĝenerala Kunveno, kiu elektas estraron por oficdaŭro de maksimume 3 jaroj.

Kampanjo „Esperanton en la Turismon" estas lanĉita por mobilizi ĉiujn Esperanto-organizaĵojn agadi laŭplane, akordigite, por ke Esperanto fariĝu unu el la ĉefaj lingvoj en la internacia turismo.

Tabuloj kun surskribo: TURISMA ESPERANTO-SERVO aperados en konvenaj lokoj kun adresaro de loka Esperanto-societo kaj de aktivuloj pretantaj helpi turistojn. Bonkvalitaj praktikaj propagandiloj aperos de tempo al tempo por esti amase disdonataj en lokoj vizitataj de turistoj. Ĉiu Esperanto-organizaĵo starigu kaj subtenu aferkontaktojn kun vojaĝoficejoj kaj turismaj organizaĵoj.

Esperanto-organizaĵoj estas petataj starigi specialajn komisionojn aŭ fakojn por turismo. Hungara Esperanto-Asocio fondis Turisman Komisionon, kiu estas sekcio de Monda Turismo. Turisma Komisiono (TUK) de HEA konsistas el turismaj respondeculoj de la teritoriaj komitatoj. La teritoriaj komitatoj estas komisiitaj organizi helpe de turisma respondeculo (TUK-ano) teritorian subkomisionon el la lokaj E-grupoj. TUK de HEA laŭ la kampanjo ESPERANTON EN LA TURISMON ellaboris sian laborplanon por 1974. Se en ĉiu lando samorganize la landaj asocioj formos turisman Esperanto-reton plenumante la akordigitajn taskojn, la sukceso de tiu ĉi kampanjo rezultigos amasan disvastigon de Esperanto, helpos la stabiligon de la Esperanto-organizaĵoj samtempe altigante ilian aŭtoritaton kaj influon en la socio.

MONDA TURISMO laŭstatute iniciatas kaj aŭspicias vojaĝojn, ekskursojn, tendumadojn, turismajn renkontiĝojn kaj feriajn aranĝojn kies oficiala lingvo estas Esperanto.

Ĉiujare okazas en diversaj landoj pli ol cent interesaj Esperanto-aranĝoj. La turismaj komisionoj de landaj asocioj interkonsentinte preparas informojn, invitilaron pri ĉiuj aranĝoj por ke la esperan-

DU HUNGARAJ POPOLBALADOJ

KATRINJO KÁDÁR

Ho patrino, kara panjo,
Gyula-edza kara panjo,
edzinigos mi Katrinjon,
servutulan belan filnjon.

Sed mi tion ne permesas,
fil' Marteno!
Edzinigu grandsinjoran
belan filnjon.

Mi ne volas grandsinjoran
belan filnjon,
volas nur Katrinjon Kádár,
servutulan belan filnjon.

Nu, vin do forportu, kara
fil' Marteno,
plu ne filo, senherede
iru kun malbeno.

Oj, koĉero mia, oj, koĉer' pli kara,
jungu jam ĉevalojn al timono ĉara.

Kiam li ekiris vojon tre lontanan,
al Marten' Katrinjo donis tukon
manan.
Kiam ĉi man-tuko ŝanĝos sin kolore,
sciu, mia vivo ŝanĝis sin samhore.

Iras do Marteno, vale-monte iras,
jen, ekvidas ŝanĝon sur la tuk' kaj
diras:
„Oj, koĉero mia, oj, koĉer' pli kara,
Dio havas teron, la ĉevalojn hundoj,
ni turniĝu, ĉar la tuko ĵus ruĝiĝis,
do Katrinjo Kádár morte malfeliĉis."

Ĉe la vilaĝfino porkpaŝtisto staris:
Aŭdu, ho bonulo, kio ĉe vi nova?"
Nu, ni statas bone, sed vi statas male,
al Katrinjo via iĝis tre fatale,
ĉar patrino via ŝin ja forportigis,
en senfunda lago ŝin ja
dron-mortigis.

„Ho bonvolu, montru, kie tiu lago.
Miaj or', ĉevaloj, ĉar' estu la pago."

Ili tiam iris sur la lagan bordon.
„Ĉu, Katrinjo, tie vi 'stas? Diru
vorton!"

Al li ŝi respondon el la lago donis,
kaj li al ŝi saltis, kaj li kun ŝi dronis.

La patrino sendis du subakviĝistojn,
tiuj ilin trovis en brakumo morta.

Antaŭ la altaro oni unu korpon
kaj post ĝin sepultis la alian korpon.
Kapelfloroj kreskis el la polv' de
l'paro,
ili kunplektiĝis super la altaro.

La patrin' aliris, ĉiujn du deŝiris,
unu kapelfloro tiam al ŝi diris:

„Damnon al vi, damnon al vi,
ho patrino Gyula-edza,
vi dum viv' intrigis,
eĉ nun min mortigis."

LA MURDITA FRAŬLO

Oni murdis fraŭlon
por ĉeval' kaj mono,
lian korpon en riveron
puŝis por fordrono.

Ondoj lin ne glutis,
sur la bordon ĵetis,
tie pasis fiŝkaptisto,
lin en reton metis.

Lin en ret' li portis
al la plac' vilaĝa,
demandadis, kiu estas
ĉi blondul' junaĝa.

Lia patro venas
kaj lin veki penas:
„Fil', vekiĝu, venu hejmen!"
Sed li ne komprenas.

L'amatino venas
kaj lin veki penas:
„Ho, vekiĝu, min brakumu!"
Kaj ŝin li komprenas.

„Mi ne povas iri,
ĉar mi mortis, kara,
al la kolo surfrostiĝis
mia blond' buklara."

„Ĉu vi do farigos
ĉerkon jugland-lignan?"
„Mi farigos, mia perlo,
marmorŝtonan, dignan."

„Ĉu vi min priploros
en knabina rondo?"
„Mi priploros vin, amata,
antaŭ l' tuta mondo."

„Ĉu vi akompanos
min ĝis tombej-pordo?"
„Mi vin, kara, akompanos
ĝis kuŝej' de morto."

Tr. K. KALOCSAY

El la hungara popolpoezio 10 poemoj troviĝas en Hungara Antologio (1933). Ĉi tiu aldono pretiĝis sub la impulso de la interparolo kun Gyula Ortutay.

tista membraro povu elekti por si la plej konvenan. MONDA TURISMO pretigis Internacian Turisman Kalendaron por 1974. La Turisma Komisiono de HEA eldonis ĉi-jare apartan kajeron sub titolo: „HUNGARLANDO INVITAS VIN POR 1974" kun detalaj invitiloj de 7 hungarlandaj internaciaj Esperantoaranĝoj.

La 25-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso okazos en junio en la 900-jara urbo SZOLNOK kun postkongresaj amuzaj tagoj. La 12-an fojon invitas GYULA partopreni en julio la Someran Esperanto-Universitaton (SEU). La partoprenintinoj de SEU estas invitataj de la virina Komisiono de HEA viziti la tradician Internacian Virinan Renkontiĝon la 15-an de julio en BUDAPEST. Esperantistajn gelernantojn, pionirojn atendas la 7-a Pionira Internacia Tendumado (PIT) por lingva praktiko en julio apud Balatono en BALATONFENYVES. ABALIGET invitas naturamikojn al la 7-a Internacia Renkontiĝo Naturamika (IREN) en julio, ekskursi, ferii en arbara kampadejo. Varian Internacian Semajnon (VIS) aranĝas en aŭgusto la Budapeŝta Teritoria komitato, kiu invitas ankaŭ al gaja jarfina programo en la hungara ĉefurbo BUDAPEST en la 4-a Vintra Esperantista Ferio (VEF).

Ni estas konvinkitaj, ke per tia organizita unueca agado sur turismaj kampoj ni kontribuos al la aplikado de Esperanto en praktika vasta tereno de la vivo, kie konstante oni movas en ĉiu parto de la mondo milionojn da turistoj kaj ĝuste tiajn homojn, kiuj interesiĝas pri la mondo kaj popoloj, viziteblaj nur inter pacaj cirkonstancoj.

ELIZABETA PALLÓS

Ekskurso al la Belarta Muzeo

Skulptaĵo de Leonardo da Vinci

Karaj amikoj, permesu al mi inviti vin al malgranda ekskurso en muzeon. Ĝia nomo estas: Budapeŝta Belarta Muzeo. Ĝia konstruaĵo staras sur la Placo de Herooj (Hősök tere) ekde 1906, kiam la du arkitektoj, Fülöp Herzog kaj Albert Schikedanz finis ĝian sesjaran konstruadon. La kolonaro kaj la timpano super ĝi memorigas antikvajn templojn. La palaco estas la lasta grandsignifa verko de la historiisma stilo en Hungario.

Venante, dekstre ni trovas la antikvan kolekton. Ĝi ne estas unu el la plej famaj kaj riĉaj, tamen havas kelkajn atentindajn objektojn. El ili la plej fama estas la t. n. „Budapeŝta dancistino", malgranda greka marmorstatuo el la 3-a jc. a.n.e, memoraĵo de helenisma arto, majstraĵo de postklasika helena skulpto.

Veninte el la greka-romia kolekto ni ascendu la ŝtuparon kaj iru dekstren. Tuj ni trovas nin en la unuaj haloj de la Antikva Galerio, kiu estas la plej grava kolekto de la Muzeo kun siaj 2400 pentraĵoj, el kiuj 650 estas ĉiam videblaj en la konstanta ekspozicio. 650 bildoj! Eĉ pri la dekono de tia kvanto estas malfacile paroli. Permesu al mi, ke mi montru sur la paĝoj de HV ne ĝuste la plej famajn el ili, sed tiujn, kiuj por mi estas la plej karaj.

Tiel ekzemple en la dua halo maldekstre pendas malgranda pentraĵo de *Sasetta* el la 15-a jc. Sur la tabuleto estas videbla Tomaso de Akvino preĝanta antaŭ altaro, lia biblioteko, monaĥejo, ĝardeno. Vera ĉefverko. Se oni iras maldekstren, en la sekvaj du haloj oni trovas preskaŭ ĉiun italan skolon de la 15-a jc., tamen malmultaj estas ĉi tie la verkoj de veraj grandaj majstroj. Sed poste oni trovas jam pentraĵojn de la matura renesanco: verkojn de *Tiziano, Tintoretto, Veronese* kaj aliaj. El ili la plej bela estas eble la portreto de Antonio Broccardo far Zorzi aŭ *Giorgione da Castelfranco.* La melankolia junulo antaŭ balkono estis fama poeto de la tiutempa Venecio.

En la nova malgranda halo inter la pentraĵoj de la skolo de Leonardo da Vinci pendas du verkoj de *Antonio Boltraffio:* la fama Madono de Lodi kaj malgranda, bela Madono, kiun oni longtempe opiniis originalaĵo de Leonardo. La belega ludo de lumomallumo, la delikata rideto de Maria permesas kredi, ke la pentraĵo gardas spurojn de la peniko de Leonardo. En la sekvaj malgrandaj haloj, t.n. „kabinetoj" oni povas vidi kelkajn ĉefverkojn. El inter ili la du pentraĵoj de *Raffaello Santi* estas la plej belaj: Madono Esterházy (laŭ la kolekto, kie ĝi troviĝis) kaj portreto de Pietro Bembo. La harmonio de idilia landvidaĵo kaj la ĉarma sceno aŭ bela vizaĝo de junulo bone karakterizas la „roman etapon" de la verkado de Raffaello.

Irante plu inter la multaj produktoj de la malfrurenesanca „manierismo", ni ekvidas reprezentanton de la freŝa, admirinda belo, bildon de *Correggio* (Antonio Allegri). La ĉarmega rideto, admirata de Goethe mem, la leonardeska „sfumato" („fumaj" ombroj) sur la figuroj de Madonna del latte (Madono nutranta per sia lakto) montras, ke la pentraĵo estas matura verko de la majstro.

Estu permesate ne paroli pri la baroka kolekto itala, kvankam en ĝi troviĝas kelkaj mondfamaj verkoj, sed, gvidante vin tra la kabinetoj, montri al vi la pentraĵojn de Nederlandaj majstroj. La plej fama el tiu kolekto estas „Predikado de Johano la Baptanto" far *Pieter Breughel la oldulo* (aŭ B. la kampano). Ĉiu vizaĝo montras memstaran karakteron kaj dekoj da tiuj estas sur la bildo. El la posta tempo de Nederlando la plej belaj pecoj estas du portretoj de *Frans Hals* kaj tri pentraĵoj de *Rembrandt:* Buĉita bovo, Sonĝo de Jozefo kaj Portreto de maljuna rabeno. Rigardinte ilin, ni iru al la plej riĉa parto de la muzeo, la hispana galerio. Ĝi estas la plej riĉa kolekto de la hispanaj majstroj ekster la landlimoj de Hispanio.

Krom la pentraĵoj el la hispana mezepoko ĉi tie videblas 7 verkoj de Domenikos Theotokopulos aŭ pli konate *El Greco* (La Greko). La fantaziaj lumefektoj, plilongigitaj formoj atestas pri la unika ekstazo de la „elgreka" arto. Rigardinte la verkojn de *Zurbarán, Murillo, Ribera* k.a. ni trovas nin en la lasta hispana haleto.

Sur la belega bildo de *Velasquez,* montranta kampulojn ĉe-table kaj kvar verkoj de *Goya* ni vidas la plej karakterizajn hispanajn tipojn. La belaj, sanaj homoj de *don Diego* kaj la eterna gajo de „Akvoportantino" far *Goya* rakontas pri la nevenkebla forto de popolo.

Venante al la Germana kolekto ni ĵetu rigardon al la longa muro, kie viciĝas la pentraĵoj de *Lucas Cranach* kaj haltu por momento antaŭ la portreto fare de *Dürer.*

Preteririnte la anglan, francan, flandran kolektojn ni rigardu la bildojn de la Moderna Galerio. Kvankam ĝi ne estas tro riĉa, tamen ankaŭ ĉi tie oni povas trovi kelkajn mondfamajn artaĵojn: bildojn de *Manet, Monet, Pissarro, Delacroix, Renoir, Daubigny, Courbet, Corot, Cézanne,* k.a.

Fininte la viziton en la galerioj, ni iru por momento du etaĝojn supren. Inter la ne tro gravaj skulptaĵoj troveblas la fama „Rajdanto", kiu montras sur prancanta ĉevalo Franciskon la I-an en rolo de Arturo en kavalira turniro. Ĝi estas la sola ĝis nun restinta skulptaĵo de *Leonardo da Vinci.*

Irante malsupren ni trovas la Kolektojn de Grafiko, de la Moderna Skulpturo kaj la Egiptan Ekspozicion. Ankaŭ ili estas tre interesaj kaj belaj, sed nun ni ne havas tempon por rigardi ilin. Eble la sekvan fojon.

Adiaŭante, ni konkludu: la Belarta Muzeo de Budapeŝto eble ne estas unuaranga muzeo, sed onidire, inter la duarangaj muzeoj ĝi staras certe sur la unua loko.

PÉTER RADOS

El kolekto de GYULA ORTUTAY:

La stulta junulo

Virinoj de Kalocsa (hungara regiono)

Estis iam malriĉa homo. Post sia morto li lasis al siaj tri filoj unu virbovon. Sed la filoj ne povis interkonsenti, al kiu apartenu la virbovo. Ili do interkonsentis, ke ili tri konstruu po unu stalon kaj al tiu ĝi apartenu, en kies stalon enkuras la virbovo. Nu, ili konstruis. La du pli aĝaj tiel pompajn, ke eĉ la pastro povintus loĝi en ili. La tria, kiu estis iom stulta, plektis unu el simpla betulvergaĵo. Oni liberigis la virbovon kaj tiu kuris rekte en la stalon el vergoj.

La du pli aĝaj junuloj multe ĉaĝreniĝis, sed ili mem volis tiel, ili do devis cedi la virbovon al la stultulo. Kaj tiu tuj ĵetis ŝnuregon sur la kapon de la virbovo kaj kondukis ĝin per tiu al la foiro. Kiam li iris sur la ŝoseo, estiĝis granda vento kaj granda, kurba salikarbo komencis knaradi, kvazaŭ la sikula ĉaro.

Hm — pensis en si mem la stulta junulo — tiu verŝajne deziras aĉeti la virbovon.

Nu kiom vi donas por ĝi? — li kriis al la arbo, sed la saliko nur knaris, knaradis. Jes, ja — pensis la junulo — mi vidas, tiu bezonus ĝin, se mi forhakus ambaŭ kornojn. — Li do ekagis kaj dum momento forhakis ambaŭ kornojn de la virbovo. Sed la saliko nur knaradis.

— Do vi ne havas nun monon? Ne gravas, eĉ estas bone tiel! — Poste li denove ekkriis: — Mi venos la sekvontan semajnon. — Kaj li ligis la virbovon al la saliko, poste li ekiris hejmen.

Hejme demandis lin liaj fratoj.

— Nu stultulo, ĉu vi vendis la virbovon?

— Jes ja — respondis la stulta junulo.

— Al kiu vi vendis ĝin, stultulo? Mi scias, ke oni terure trompis vin, — incitis lin la pli aĝa frato.

— Sed ĝi ja estas sur bona loko, amiko. Mi vendis ĝin al kurba saliko por kvardek forintoj.

— Kaj kie estas la mono?

— Ĝi donos ĝin la sekvontan semajnon, kiam mi iros sur tiu vojo! — La du fratoj ekridegis. — Nu, vi unika frenezulo! Vi ja bone vendis ĝin, vi ricevos la prezon viandmanĝan Sanktan Vendredon. La stulta junulo eĉ ne atentis siajn fratojn. Li iris la alian semajnon al la saliko kaj petis la monon, sed tiu eĉ ne diris: „HU!".

— Tiel do! — li diris —, do tia estas la honesto? — Li ekprenis la hakilon kaj frapis fortege al la saliko, kiu jen elteriĝis. Li rigardis al ties loko, kaj jen, senmezure granda kaldrono kun mono estis sub ĝi. Tiam la junulo diris al la saliko: Nu, aŭdu, el tio mi forportos vian ŝuldon, la ceteron mi forportas por interespago. — kaj tiel, kiel ĝi estis, li suprenlevis la kaldronon, tiris ĝin sur la tenilon de la hakilo, svingis ĝin sur sian ŝultron kaj eĉ ne haltis, ĝis li atingis sian hejmon.

Alveninte la aliaj du junuloj ekvidis la multegan monon, ili flustris unu al la alia interkonsente, ke la mono estus pli bona por ili, ol por la stultulo. — Ni mortigu lin nokte — flustris unu. — Poste ni ĵetu lin en akvon — flustre diris la alia. — Sed la stultulo havis bonajn orelojn, li ekaŭdis, kion intencas liaj fratoj. Li do forkuris dum la nokto el la hejmo kaj iris rekte al la reĝo por plendi. Sed tiu reĝo havis tian filinon, kiun ankoraŭ neniu homa estaĵo povis ekridigi kaj tial ŝi falis en daŭran melankolion. Sed kiam la stulta junulo rakontis sian plendon, la knabino ekridegis, ke la tuta domo resonis. Tiam diris la reĝo: — Nu, junulo! mi promesis, ke tiu, kiu povas ekridigi mian filinon, ricevos ŝin, kiel edzinon. Mi ne ŝanĝas mian vorton. Mi donos al vi mian filinon kaj la duonon de mia regno kaj ordonos pendigi viajn fratojn.

— Mia reĝa mosto! Ne pendigu la malfeliĉulojn, ili taŭgos bone en la korto, kiel kampservistoj.

— Nu bone — diris la reĝo — estu laŭ via deziro.

Poste ili aranĝis tian regalon, sed tian, ke dum sep tagoj kaj sep semajnoj eĉ la ĉevalo trinkis vinon. Poste la ama paro sidiĝis en ovoŝelon kaj flosis en tiu laŭflue sur la rivero Küküllő, se ili elŝipiĝos, ili estu viaj gastoj.

Tr.: P. Balkányi

Gábor Magyari*:

Subteraj mirakloj de la naturo

— Pri hungariaj grotoj por turistoj —

El la natur-trezoraro de Hungario havas elstaran signifon la grotoj. Iliaj monumentaj ampleksoj, varia formriĉeco, abunda konglomerato, arkeologiaj trovaĵoj, subteraj lagoj kaj riveroj havantaj kristale puran akvon, la akvofaloj, kaj la kuracefiko de ilia aero egale allogas kaj la fakulojn kaj la turistojn.

La grotoj konsistantaj el kalkŝtono kaj dolomito formiĝas en la montregionoj karstiĝantaj fare de la solvefiko de akvo kaj erod-efekto de la sedimento. Pro tio la Hungariaj grotoj troviĝas ĉefe en la karstaj montregionoj de Transdanubio kaj en la Nord-Orienta parto de la lando.

En la Hungara Meza Montaro apud la lago Balaton du grotoj estas viziteblaj por turistoj. En *Balatonfüred* la groto — nomata pri fama naskito de la urbeto, pri la Azio-esploristo geologo Lajos Lóczy — havas interesajn koridorojn kaj ĉambregojn kreitajn de postvulkana varmakvo iam eksplodiĝinta surteren, kaj tie la interesiĝantoj povas ekoni la aluviajn mineralojn.

En *Tapolca* sub la urbo situas grotlabirinto parte inundita de akvo. Sur la kristale pura akvo de la grota lago la turistoj el boatoj povas pririgardi la interesaĵojn.

Ĉe la suda parto de Montaro *Mecsek*, en *Abaliget* oni trovas stalaktit- kaj stalagmitgroton kun rivereto. El la stalagmitoj pluraj ruiniĝis, sed la beleco de la netuŝitaj formiĝintaĵoj en la antaŭ nelonge malkovritaj partoj, kaj la lirlado de akvofaloj de la engrota rivereto fascinas ĉiun naturamikon. Proksime al la groto troviĝas hotelo, kampadejo kaj lagoj konvenaj por akvaj sportoj. Ne estas hazardo, ke tiun lokon elektis la hungaraj esperantistoj por ĉiujara sukcesa IREN-aranĝaĵo.

La grotojn de *Budapest* grandparte elformis la varmakvaj fontoj elspruĉantaj apud Danubo. De plej longa tempo estas vizitebla la stalaktita groto de *Pálvögy*, kies galerioj formas labirinton etendiĝantan en ĉiu direkto de la spaco. Inter la koridoroj, unuj la aliajn krucantaj en malsama nivelo, tra krutaj ŝtuparoj, eĉ tra eskaloj kondukas konstruita vojo. La grandaj, profundaĵoj kaj altaĵoj estas bone distingitaj per lerte lokigitaj lumefikoj.

La koridoroj de la *Fortikaĵ-groto* de *Buda* formas reton sub granda parto de la fortikaĵ-teritorio. La plurajn kilometrojn longa groto situas sur sama nivelo, ok-dek metrojn sub tiu de la stratoj. Ĝiajn kavojn la loĝantaro de la fortikaĵo uzis por rifuĝejo dum la turka okupado, pro tio en ĝi restis multaj historiaj trovaĵoj. La turistgvidantoj-specialistoj ĉefe tiujn koridorojn kaj ĉambregojn, riĉajn je historiaj materialoj prezentas al la interesiĝantoj.

La plimulto de la grotoj situas en la Nord-Orienta landparto, en la Norda Karstregiono.

En la montaro Bükk, en la ĉirkaŭaĵo de Miskolc, ni trovas plukonstruitajn grotojn. La István-groto en Lillafüred pro belaj stalagmitoj, la Anna-groto pro eksterordinaraj vegetaĵfosilioj estas menciindaj.



„Salono por koncertoj" — Groto de „Baradla" en Aggtelek

La varmakvaj fontoj de la termalbanejo en Miskolc-Tapolca elspruĉas parte en grotkavoj.

Kune kun fontakvo eksplodiĝas en malgranda kvanto ankaŭ kuracefikaj radioaktivaj gasoj. Por la utiligo de tiu kuracefiko, trarompante la rokon inter la groto kaj banejo, oni konstruis tunelon kaj tiel formis la groton agrabla kuracbanejo. La populareco de tiu banejo estas unika.

La Karstregiono situanta norde de Miskolc estas unu el la plej signifaj grotparadizoj de Eŭropo. Ĝiaj grandaj grotkavoj havas internacian gravon kaj el turisma vid-

---

** La aŭtoro estas geologo, unu el la malkovrintoj de groto Béke, poste dum ses jaroj (1963—69) li estis direktoro de Grotaro de Aggtelek. Pri fakaj temoj li plurfoje prelegis ĉe SEU en Gyula.*

punkto kaj rigarde al kuracado. Unu el inter la plurajn kilometrojn longaj grotoj, la groto Baradla estas konata jam de jarmiloj. Ĝi estis konstanta loĝloko de la ŝton-, kaj ferepoka prahomo. La fremdultrafiko turnis sin al ĝi antaŭ 200 jaroj.

Ĝis nun estas konata ĝia 24 kilometrojn longa parto, kies kvinkilometra etapo etendiĝas trans la landlimon, kaj en Ĉehoslovakio kiel „Domica" estas konata vidindaĵo.

Tiun grotaron, etendiĝantan ĉe landlimo sub pluraj vilaĝoj, ĉiutage vizitadas miloj da homoj, tra pluraj enirejoj. La moderne elformitajn, admirinde prilumigitajn ĉambregojn ornamas riĉa aro de stalaktitoj kaj stalagmitoj, kies koloro kaj formo superas ĉies fantazion. En unu salono dekorita de grandegaj stalagmitoj oni aranĝas en la ĉefsezono koncertojn en medio de mirinda akustiko. La amplekso de la koncertsalono estas superba: 1000 homoj povas samtempe ĝui tie la belecon de la muziko kaj de la naturo.

Al ĝi najbare situas la groto Béke (Paco), kies naturaj valoroj konkuras kun tiuj de Baradla, sed pli gravas ĝia terapia signifo. Tie en sanatorio — apartenanta al Karbminista Entrepreno — oni jam de jaroj kuracas malsanulojn pro astmo kaj trake-kataro — kun bona rezulto.

Ankaŭ Julio Baghy pasigis tie iom longan tempon en siaj lastaj jaroj, kaj tiu ripozo donis al li plifaciliĝon kaj refreŝiĝon.

En la ĉirkaŭaĵo de la grotoj Baradla kaj Béke, en Aggtelek kaj Jósvafő, modernaj hoteloj, turistdomoj, restoracioj, signitaj turistvojoj, ebloj por fiŝkaptado kaj ĉasado atendas la interesiĝantajn fremdulojn, kiujn allogas la grandiozaj subteraj mirakloj de la naturo.

Tr.: *M. Fejes*



„La scenejo" en groto de „Baradla" en Jósvafő



MODERNECO
MAKSIMUMA KOMFORTO
MODERA PREZO

Meblofabriko
KANIZSA

Moderna produktado–moderna produktaĵo!
Loĝoĉambroj Kanizsa–IV, Piccolo, Karina–I, Karina–II, Kékes, Kupido, Kata, Korona, Titusz, –junulara ĉambro Tavasz kaj infanĉambro Kari.
Tapetitaj garnituroj Kedvenc, Rio, Tirol, Piccolo, Titusz. Andrea unupersonaj kaj Kanizsa dupersonaj sofoj, kuŝejoj.
Petu tiujn produktaĵojn – niaj produktoj estas aĉeteblaj en la tuta lando!

Adreso: KANIZSA BÚTORGYÁR (Meblofabriko Kanizsa) 8801 Nagykanizsa, Szemere u. 4. Pf.: 55

Turo de malnova preĝejo en Szentendre, en la subĉiela muzeo

La naci-malplimultoj en Hungarlando

Unu el niaj iamaj saĝuloj, József Eötvös, *politikisto, verkisto kaj ministro por instruado — kies monumento staras en Budapest sur placo ĉe la Scienca Akademio — deklaris iam, ke „nacieco estas ne alia, ol konscio pri la solidareco, kiu kreiĝas el la memoroj de komuna paseo kaj el komunaj interesoj kaj kunsentoj... Ne tiu pravas, kiu volas sin apartigi de ĉiu nacieca sento, sed tiu, kiu entuziasme por la interesoj de sia propra nacieco, ne forgesas, ke la aliaj sentas same varme... kaj nia celo estu, ke ĉiuj naciecoj en nia patrujo ricevu la realiĝon de siaj pretendoj laŭ la plej bona eblo..."*

Tiu vero — iam tutmonde realigenda, por kiu ni esperantistoj kune klopodu — realiĝas en la nuna Hungara Popoldemokratio. Pasis la tempo de la nacia orgojlo kontraŭ aliaj naciecoj kaj de la ŝovinismo. Ne, nun ĉiuj naci-minoritatoj en Hungarlando estas samrajtaj kaj la hungara konstitucio al ĉiuj ebligas la saman liberan kulturan kaj popolan vivon kun la samaj rajtoj kaj devoj por ĉiuj. Ili havas siajn reprezentantojn en ĉiuj forumoj de la publika vivo ekde la komunumaj konsilioj ĝis la parlamento.

Kun la subteno de la Patriota Popolfronto la kvar asocioj de la hungarlandaj rumanoj, germanoj, slovakoj kaj sudslavoj povas realigi sian aktivecon bazante sin sur larĝaj amas-interrilatoj. La afero de la naciecoj ĉie, kie vivas homoj kun aliaj gepatraj lingvoj, estas organika parto de la laboro de la konsilioj. En kelkaj departementoj jam laboras eĉ apartaj subkomisionoj por la naciecaj aferoj. Tia ĝusta politiko estas la bazo de la kultura progreso. Malgraŭ la manko de sufiĉaj instruistoj jam nun en 315 ĝeneralaj lernejoj en 7 gimnazioj kaj en 8 kolegioj — aldone en 95 infanĝardenoj — la instruado okazas en la lingvo de la koncerna naci-minoritato. Oni instruas ilin, ke ili estimu sian kulturon kaj poste flegu ties progresigon. La ekipaĵo de la lernejoj estas ĝenerale bona. En kelkaj departementoj oni eĉ donas stipendiojn al la lernantoj. Kompreneble tion oni intencas ĝeneraligi. Oni diras, ke „la nacio vivas en sia lingvo", tial la uzo kaj utiligo de la gepatra lingvo estas decide grava ankaŭ por la naci-malplimultoj. Ne okazu do, ke se iu forlasas sian vilaĝon, se iu iras en minejon, tiam tiu foriĝu de sia gepatra lingvo. Krom la instruado oni klopodas zorgi por konservi la propran lingvon ankaŭ en aliaj kulturrondoj. Oni kreis bazajn bibliotekojn, oni akcelas la sciencan esplorlaboron, la infanliteraturon, oni volas kontentigi la diversajn bezonojn de la legantaro. Oni pli akcelas la agadon de naci-minoritataj memstaraj kulturgrupoj, danc- kaj kant-grupoj kaj oni helpas tiujn grupojn, kiuj celas disvastigi la literaturon de sia lingvo. Ĝoje ni vidas ilian oftan aperon sur la ekrano de la televido kaj en diversaj kulturdomoj. Ankaŭ en la kadro de provincaj radiostacioj sur la naci-minoritataj teritorioj ĉiam pli multiĝas la programoj en ilia lingvo. La ĵurnaloj de la kvar naci-minoritatoj aperas semajne en 80 mil ekzempleroj. Ni ne forgesu la gajecon de la oftaj komunaj baloj, festkunvenoj kaj la naciecajn tagojn.

La celo ne estas la asimilado — kiel en kelkaj okcidentaj landoj —, sed la sana integrado. La vera patrujamo al la komuna patrujo por la komunaj celoj kaj interesoj, sen rezigno pri la propra lingvo kaj kulturo!

Kaj la tuto riĉigas la tutan hungaran kulturon! Simile, kiel la utiligo de la naciaj kultur-kreaĵoj — ĝuste ankaŭ per Esperanto — riĉigas la tutmondan kulturon. En ĉiuj ŝtatoj la naci-minoritatoj devas ricevi samajn rajtojn, koni kaj konigi reciproke la agadon kaj kulturon de la aliaj naciecoj, de la grandaj nacioj kaj por tio solidare devas kunlabori per Esperanto ankaŭ nia tutmonda movado.

P. B.

panoramo

La okcidentajn landojn minacas la manko de oleo. Sovetunio krom la propra bezono abunde provizas per ĝi la socialismajn landojn. 90 procentojn de sia bezonaĵo Hungario ricevas el la Sovjetunio per tubokondukilo, kiu estas ege malkara metodo por la transporto. Laŭ la ekonomia projekto la Proksimorientan oleon oni ekspedos al nia lando el la Adriamara ŝiphaveno, tra Jugoslavio, per tubokondukilo. La prepariĝo jam finiĝis, la preskaŭ 2 miliardoj da forintoj estas disponeblaj, tial en la venonta jaro oni komencas konstrui la hungaran linion de la tubokondukilo havonta kalibron de 600 mm-oj ĝis la oleorafina kombinato Százhalombatta. La investanto kaj realiganto estas hungara, la Siófoka Petrolkondukila Entrepreno.

* * *

Ne delonge formiĝis la Hungara Ornitologia Asocio, kiu estas plivastigita organizaĵo de la ĝisnuna Hungara Ornitologia Instituto. En la ĝenerala kunsido, d-ro Zoltán Rakonczai, prezidanto de la Tutlanda Naturdefenda Oficejo, komunikis, ke la naturdefendado bezonas socian bazon inter la larĝa popolo, ĉar sen homa helpo nenia oficejo povas validigi la leĝon pri defendateco. En nia lando pli ol 300 birdorasoj ricevas ŝirmon, sed pro homa malico miloj da birdoj ekstermiĝas.

* * *

La bibliografio de hungaraj miniaturaj libroj unuafoje aperis en la jaro 1972; la kunmetaĵo de Gyula Janka enhavas la priskribon de 107 malgrandaj libroj, kiuj estis eldonitaj inter la jaroj 1945 kaj 1970 en Hungario. Ĉe la Teknika Libroeldonejo nun aperis la dua bibliografio — la aŭtoro estas ankaŭ nun Gyula Janka — kiu konigas tiujn miniaturajn librojn, kiuj estis eldonitaj en la jaroj 1971—1972. En la nova libro estas troveblaj 101 novaj fotoj pri la pli novaj miniaturaj libroj; kies priskribon la verkisto konigas en hungara, rusa kaj angla lingvoj. Tiu interesa bibliografio estas granda helpo por la kolektantoj de miniaturaj libroj.

* * *

Japana gazeto *Asahi Evening News*, aperanta en Tokio publikigis — kun la foto de *János Ferencsik*, ĉefmuzikestro de Hungara Ŝtata Operejo — ke en la printempo de jaro 1974 en Japanio koncertas la Hungara Ŝtata Koncerta Orkestro. La gazeto mencias, ke tio estas la unua gastrolado de hungara orkestro en Japanio, ekde la 1923-jara fondiĝo de la orkestro. Laŭ la japana gazeto, de tiu tempo famiĝis la orkestro, de kiam ĝia gvidanto estas Ferencsik.

* * *

En la tuta mondo ĉiu homo amas aŭ sopiras vojaĝi. La enlandanoj planas vojaĝon al eksterlando kaj la eksterlandanoj al nia patrio. Eterna estas la movo. Pri tiu temo parolis János Tausz la ĉefdirektoro de fremdultrafika entrepreno IBUSZ. Li konstatis, ke ĉi-rilate la pasinta jaro ne estis feliĉa el diversaj kaŭzoj, ekzemple pro la devalutado de dolaro, la proksimorienta milito, la komerca krizo de oleo ktp. Tamen centmil hungaroj vojaĝis eksterlanden kaj alvenis pli ol kvarcent mil turistoj en la organizado de IBUSZ. La ĉefdirektoro menciis, ke bedaŭrinde en nia lando ne sufiĉas la hoteloj B-kategoriaj, tial ni devas rekoni, ke inter la turistoj, kiuj vizitas nian landon, sensignifa estas nombro de multmilionuloj, la pretendoj de la plimulto ne komenciĝas ĉe la hotelo Interkontinental. Mallonge, pli da malmultekostaj hoteloj rezultigas pli da eksterlandaj turistoj. La pretendoj de la enlanda publiko koncerne vojaĝon pligrandiĝas de jaro al jaro, tial la entepreno IBUSZ. estas optimisma firmo. La programon por la 1974 jaro oni tiel kunmetis, kvazaŭ en la tuta mondo ĉie estus la plej pacaj situacioj kaj la homoj ne havus aliajn problemojn ol elektadi inter la plej konvenaj vojaĝoj. Tiamaniere la hungaroj povas vojaĝi al Meksikio, Sirio, Hispanio, apud la maron Adrio kaj preskaŭ al ĉiu parto de la mondo, se ili volas oferi monon por la plej utila elspezo, por esti mondiranto.

„Intercontinental" — nova hotelo en Budapeŝto
(Foto: Z. Fejér)

La fama hungara „sesĉevalo" en Bábolna
(Foto: Z. Fejér)

PAŬLO BALKÁNYI JUBILEAS

80 jaroj en la homa vivo per si mem imponas, eĉ en nia epoko, kiam la meza homaĝo, dank' al la medicina scienco kaj progreso de higieno ĝenerale plilongiĝis. Despli honorinda estas la homo, kiu junaĝe renkontante noblan kaj por la homaro utilan ideon, ne nur akceptis ĝin tutkore, sed restis ĝia fidela adepto inter ĉiuj cirkonstancoj dum pli ol ses jardekoj.

Baze de la indikoj troveblaj en la jubilea artikolo de K. Kalocsay (vd. 1/1964.), ni facile divenos, ke temas nun denove pri veterano Paŭlo Balkányi, *kiu atingis en la kuranta jaro jam sian 80-an naskiĝdatrevenon (11—3—1894) kaj povas fieri pri pli ol duonjarcenta esperantista paseo.*

Tia longa tempo, se ĝi pasis pasive, ne meritus pli ol simplan mencion, sed ne tiel statas la afero ĉe nia jubileanto. Eĉ helpe de la lampo de Diogeno ja vi ne trovos ĉe ni pli ageman propagandiston ol li. Fanatika obsedito de Internacia Lingvo, li eluzis ĉiun eblon, ĉiujn terenojn kaj rimedojn, kie li povis fari propagandon por Esperanto.

Jam antaŭ la unua mondmilito, en 1912 li aranĝis propagand-promenadon tra la plej frekventataj urbocentraj stratoj. Ĉirkaŭ 30 samideanoj kun flagetoj grupe trairis budapeŝtajn stratojn disdonante flugfoliojn. Tiu metodo ŝajnas hodiaŭ iom eksmoda, sed ne forgesu, ke iniciatis kaj realigis ĝin 18-jara entuziasmulo antaŭ 60 jaroj, en epoko kiam la movado bezonis ankaŭ tiajn spektaklajn rimedojn. Cetere, la esenco de tiu ideo, nome „Esperanton sur la straton" estas eĉ hodiaŭ aktuala kaj la hungarlingva „Eszperantó Magazin" celas ĝuste la samon: forlasi la eburan turon kaj penetri en la densaĵon de la strata publiko por povi pli efike ataki la indiferenton de la eksteruloj.

La unuan paŝon sekvis poste aliaj serie. Ni ne volas ilin detale katalogi, sed indas mencii, ke li estas la unua, kiu aranĝis ĉe ni ekspozicion en lernejo (1913) uzante amason da esperantaĵoj (afiŝoj, libroj, gazetoj, ilustritaj poŝtkartoj ktp) akiritaj ekskluzive per lia ampleksa internacia korespondado. Oni uzis ĉe ni unuafoje Esperantlingvan poŝtan stampilon en ekspozicio (Ea kaj filatelista) aranĝita de Balkányi en 1918. En la sama jaro li sukcesis atingi, ke en kadro de militekspozicio sur la Margaret-insulo Esperanto ricevis apartan vitroŝrankon kaj en la oficiala katalogo unuafoje aperis teksto E-lingva. En la filatelista ekspozicio en 1924 unuafoje ricevis diplomon Esperanto-angulo aranĝita kompreneble de P. B.

Tiuj indikoj estas nur gutetoj en la maro de la ampleksa kaj multfaceta propagandlaboro. Brile kaj koncize aprecis K. Kalocsay la vastan agadon de nia jubileanto en la menciita artikolo kaj tial mi nur referencas tiun. Tamen pro la graveco de la presio, ni refreŝigas, ke P. Balkányi organizis siatempe regulan gazetservon kaj helpe de tio li atingis, ke en 1924 tutlande aperis pli ol 800 sciigoj en la hungara gazetaro. Elstara rezulto, kaj estus bone, se ni povus fieri hodiaŭ almenaŭ pri ties duono.

Ni erarus pensante, ke nia samideano, honora membro de UEA, komitatano de HEA, ĉefkunlaboranto de HV, freŝa distingito en 1973 per la 20-jara jubilea MEM-medalo, atinginte antaŭ 10 jaroj sian aĝon de 70 jaroj, sinkis en la komfortan fotelon de la rajte meritita kvieto. Ne, li restis ankoraŭ dum jaroj viviga forto de unu el la plej bonaj budapeŝtaj E-grupoj, instruis, ekzamenigis novicojn kaj nelacigeble plu verkis kaj verkas eĉ nun artikolojn por H. V., H. E., Paco.

Enviinda laboremo kaj laborkapablo! Ni kore deziras ke la Sorto donacu al li ankoraŭ longan rezultoplenan vivon en bona sano kaj forto.

d-ro Jozefo MÁTÉFFY
prez. de HEA

Recenzo

Andrzej Pettyn: Rozmówki esperanckie (Esperanta konversacio) Eld.: Wiedza Powszechna, Varsovio 1973. 232. p. Prezo: 15,— zlotoj.

La libro de Pettyn — fakte multe pli ol nura konversacia libro — en dek ses temoj prezentas al la polaj legantoj plurajn milojn de utilegaj frazoj en korekta Esperanto. La libro celas unuavice polajn legantojn.

* * *

Alberto Gomez Cruz: Clave de Esperanto (Esperanto-ŝlosilo en la hispana lingvo). 106 paĝoj. Dua, reviziita eldono. Guadalajara (Meksikio), 1973. Prezo: 1 dolaro.

La libro prezentas bone resumitan gramatikon de Esperanto kaj lerte selektitan, tamen sufiĉe ampleksan — kun 3600 vortoj — dudirektan vortaron. Tre taŭga lernilo por hispanlingvanoj.

V. B.

ARANĜAĴOJ EN HUNGARIO

3. III. Budapeŝto, Jarkunsido de HEA.
21—23. VI. 25-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso en Szolnok,
24—27. VI. Postkongreso, Szolnok.
6—7. VII. Fervojista Esperantista Renkontiĝo en Szombathely.
10—20. VII. 7-a Internacia Pionira Tendumado en Sikonda.
7—13. VII. 12-a *Somera Esperanto-Universitato en Gyula.*
15—24. VII. 7-a Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Naturamikoj en Abaliget.
Septembro: Seminarioj en Zánka ĉe Balaton.
29. XII 1974. — 3. I. 1975. 4-a Vintra Esperantista Ferio en Budapeŝto.

ARANĜAĴOJ EN EKSTERLANDO

En majo: Scienca simpozio „La internacia lingvo kaj geologio". Organizanto: la geologia sekcio de ISAE. La prelegoj okazos en du lingvoj, Esperanta kaj pola.
11—17. V. 26-a IFEF-Kongreso, Tarragona, Hispanio.
27. VII. — 3. VIII. 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburg. Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.
27. VII. — 3. VIII. 42a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en kadro de UK. Adreso: K. H. Hoffmann, Gemseneck 14, D—2. Hamburg 54.

Interparolo kun Gy. Ortutay pri la hungaraj folklor-esploroj

Por renkontiĝi kun *Gyula Ortutay*, kun strangaj, amare strangaj sentoj mi ekiris al la Budaburga kreo-hejmo de la hungara folklor-scienco. Jes, ĉar ni, hungaroj, jam de jaroj malfermadas la fenestrojn ale al aliaj ĉielzonoj kaj klopodas paroligi hungare la fabelojn kaj baladojn naskiĝintajn aliregione, en la folkloroj rumana, serbo-kroata, slovaka, sed ĉu ekparolos iam en aliaj lingvoj la hungara popol-poezio?

Fakte, ĝis nun apenaŭ aperis iom el ĝi alilingve. Ankaŭ niaj popolfabeloj mankas eĉ en la famekonata Diederichs-serio, ĉar ties redaktoro, Friedrich von der Leyen, sentis sia persona afero, ke ili tie ne enestu. Ortutay volonte citas anekdote la motivadon de von der Leyen: „La hungaroj, eĉ se por mallonga tempo, arestis en 1918 generalon Mackensen, kaj tion mi ne povas pardoni." Kaj li tenis sin al sia malpardono dum jardekoj.

Tamen, la germanlingva volumo de Ortutay „Hungaraj Popolfabeloj" rompis ne nur tiun rankoron, sed ankaŭ la indiferenton de la mondo. De tiam ĝi aperis ĉeĥe, finne, angle, ĵus ruslingve, kaj jam prepariĝas entuziasmaj japanaj etnologoj traduki kaj publikigi la kolekton „Fabeloj de Mihály Fedics", kiu reprezentas la Ortutay-an metodon individuo-esploran.

La afero de la hungaraj popolbaladoj jam statas pli malbone, kvankam soveta poeto estas venonta al ni por provi la maleblaĵon, kaj Ortutay scias jam ankaŭ pri poetoj anglaj, kiuj volonte tradukus hungarajn popolbaladojn malgraŭ la malfacilaĵoj penigajklopodigaj, kiujn tio kostas; kiu provis, scias tion.

La popolmuziko estas io alia. Dank' al Bartók kaj Kodály pli kompreneble nun sonas ankaŭ en Ameriko la kantoj de la iamaj agrarproletoj. La muziko estas super popoloj kaj nacioj.

Ortutay ĉiam instruis en siaj universitataj prelegoj la penson, kiu gvidfadene tiriĝas tra lia tuta vivoverko, ke la etnografio devas emfazi ne tion, kio disigas, sed tion, kio kunligas. Ĉi tiu tezo ankaŭ nun estas valida, kaj ĝi estas eĉ pli aktuala en nia ŝanĝiĝanta mondo.

— Nu, ankaŭ ĉi tiu tezo havas duoblan sencon — diras Gyula Ortutay. — Politike nepre ĝustas emfazi tion, kio nin kunligas. Sed la esploranto, laŭ la ekzemplo de Bartók, devas atenti ne nur pri tio, kio kunligas nin kun aliaj popoloj ĉi tie en Eŭropo aŭ eĉ en Eŭrazio. Ankaŭ tion necesas konsideri, en kio ni diferencas. Ne temas pri tio, kio disigas, sed en kio ni diferencas. Ĝuste tio difinas nome la naciajn formojn, la naciajn karakterojn. Por esplori aŭtente ĉi tiujn interdependojn, ni devas ekkoni la unuecan folkloran materialon el kiel eble plej aŭtentaj fontoj. Tial mi urĝis jam de longaj jaroj, ke la *tekstojn* de la hungara popolpoezio (kiuj ne estas malpli belaj ol la melodioj) oni publikigu en aŭtenta eldono en fremdaj lingvoj. Granda merito de la Hung. Scienca Akademio estas, ke en preskaŭ duoncento da ACTA ĝi publikigas diversajn studojn en kvar mondlingvoj. Inter tiuj studoj ankaŭ la hungara etnografio jam de du jardekoj komunikas la rezultojn de siaj esploroj en la volumoj de *Acta Geographica*. Mi sentas pli grava ol io ajn, ke la tutan riĉon de nia popolpoezio kaj popolfabelaro ni konigu al la granda mondo.

Jes, montri nin mem — mi diras —, sed kian spegulbildon ni havu pri ni mem? Kio estas la tasko de la hungara folklor-scienco en niaj tagoj post nia pli strikta pordego, sur la hungara lingvoteritorio?

— Senŝanĝe ekzistas du gravaj taskoj: kolektado kaj publikigado. Unuavice la kolektado, kaj ĉi tiun laboron ne neglektas la Geografia Muzeo; sen kolekto de memoraĵ-objektoj ne eblas ja realigi nian Liberaeran Etnografian Muzeon en *Szentendre*, nek la aliajn, la provincajn. Ĉi tiuj montras kaj la labortagojn kamparanajn, kun ties laboriloj, kaj la valoran materialon de la popolaj talentoj de ornamado-artistado. Ankaŭ ni, folkloristoj, kolektadas plu, kaj kelkfoje ni trovas tian akiraĵon, kiel la trivolumaj „Fabeloj de Lajos Ámy", kolektitaj de *Sándor Endrész*. Tiom da materialo de unu fabeldiranto, estis, laŭ mia scio, neniam kolektita en la mondo. Ankaŭ tion mi povas diri fiere, ke nenie ekzistas serio simila al nia Kolekto de Nova Hungara Popolpoezio. Ĝis nun en 16 volumoj ni publikigis la materialon de la nunaj hungaraj fabeldirantoj kaj ni havas eldonendaĵojn ankoraŭ por jaroj; ekz-e mi, la redaktanto de la serio, publikigis ĝis nun sole la unuan volumon el mia propra kolektaĵo.

Mi turnas la parolon al la kolekto de *Zoltán Kallós*, la admirinde riĉa „Libro de Baladoj". Eĉ sonĝi mi ne kuraĝis — mi diras —, ke sur la hungara lingvoteritorio kreskas ankoraŭ sovaĝrozoj tiel riĉe. Ĉu ni povas ankoraŭ kalkuli je similaj surprizoj — mi demandas —; ĉu sur la imagita mapo de la hungara folkloro ekzistas ankoraŭ blankaj makuloj?

— La kolekto de *Zoltán Kallós* estas de fundamenta signifo — diras Ortutay. — Ĝia graveco estas, ke ĝi savis ĝis nun nekonatan balado-trezoron de historia valoro, kaj, aliflanke, ĝi atestas la unuecon de la hungara balado-poezio. Ekde la plej malnov-tipaj baladoj ĝis la plej novtipaj baladaj kantoj, preskaŭ ĉiuj parencoj de tiu ĉi artospeco enestas en la kolekto. Tiel same, kiel en la valora balado-kolekto de la transilvaniaj gimnazianoj. Kaj baldaŭ aperos fabelvolumo en la sovet—ukrainia *Ungvár (Újhorod)*, baze de tiea kolektado.



— Mi asertas, ke nur tiam ni ne trovas bonan materialon, se ni ne kolektadas. Kaj blankaj makuloj ankoraŭ troviĝas abunde. Paradoksono: la vivo de la hungara kamparanaro ŝanĝiĝis bona, do definitive pasis tiuj grandaj ebloj de kolektado, kiuj ekzistis en la feŭdala aŭ duonfeŭdala Hungario. Maloftaj estas tiel grandaj fabelistoj aŭ popolkantistoj, kiajn trovi sukcesis Erdész aŭ Kallós. Sed oni serĉu kaj tiam oni ankaŭ trovos tiajn. Jen nia devo.

Ni adiaŭas. Mia ĝenateco ĉesis; ĝin solvis niaj komunaj zorgoj. Ankaŭ li rapidas por renkontiĝi kun Zoltán Kallós kaj interŝanĝi kun li ideojn.

Tr. kvk KÁROLY KISS

Rabistoj — Grafikaĵo de Péter Gergely

La amika renkontiĝo de naciaj literaturoj

„La diversaj literaturoj povas vere progresi, se ili ne subpremas unu la alian, sed se ili lernas unu de la alia, se ili reciproke riĉiĝas, fekundiĝas.

Iliaj naciaj karakterizoj ne estas kontraŭemoj, sed reciproke kompletigas unu la alian en granda, humana sintezo, kiu ne ombras la lumantajn montpintojn de la alia literaturo, sed fortigas la lumon de unu per la alia, sen tio, ke eĉ unu el ili perdus ion de sia brila lumo."

Tiuj ĉi pens-deklaroj prenitaj el la libro de hungara verkisto György Beke, vivanta nun en Transilvanio, Rumanio, certe estas trafa konstato ankaŭ por la internacia Esperant-lingva literaturo! La libro „Sen interpretisto" enhavanta intervjuojn kun 56 verkistoj pri la hungaraj—rumanaj literaturaj interrilatoj, aperis hungare ĉe la Eldonejo Kriterion en Bucureŝti, en 1972. Sur 636 paĝoj rumanaj kaj hungaraj poetoj, verkistoj, tradukistoj, literaturhistoriistoj eldiras siajn pensojn reciproke pri la literaturoj de la amikaj popoloj, pri siaj spertoj kaj konkludoj kolektitaj dum kvar-jara laboro. Ili verkas en diversaj lingvoj, sed iliaj konfesoj akordiĝas en plej perfekta egaleco kaj reciprokeco. El tiuj konkludis la aŭtoro la opinion menciitan en la komenco de tiu ĉi raporteto. La enhavo kunigas la laboron kaj spertojn de duonjarcento. Nomojn — inter ili famajn — mi ne mencias, ja la plimulto de la legantoj ne konas ilin — bedaŭrinde. Sed la libro estas literaturhistoria fontverko pri la konstruo de la rumana—hungara amikeca ponto, pritraktante eĉ multajn komunajn rilatojn el malnovaj tempoj de nia historio. La tuta donas bonan ekzemplon por niaj literaturistoj, kiuj celas per la lingvo internacia krei amikan ponton kaj reciprokan komprenon inter la diversnaciaj literaturoj de la mondo.

Paŭlo Balkányi

Urbo sub tendo

En Nordokcidenta Siberio konstruiĝas nova kolonio per tre moderna, aŭdaca solvo. Oni metas grandegan kupolforman tendon el plasta materialo super la urbon ke la loĝantoj estu defendataj kontraŭ la tre aŭstera vetero. La planistoj Leningradaj zorgas pri ĉio, kio povas esti necesa por la loĝantoj de moderna urbo, troviĝos do tie strando kaj vendej-strato, biblioteko kaj hotelo, ktp. La vintran rekordan temperaturon de minus 40—50 gradoj oni mildigos je la agrabla printempa plus 5—20 gradoj.

Tr.: A. Pechan

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Vilmos Benczik

Ĉi-numere ni dediĉos la enigmon al la verko de Ferenc SÁNTA: *Dudek horoj,* aperinta ĉe la Eldonejo Corvina en Budapeŝto, en 1966.

1. En komenca parto de la romano unu el la rolantoj karakterizas malbone funkciantan agrikulturan kooperativon jene. *Ĝi estas pli obskura ol la plej obskura nokto.* Kio estas la nomo de tiu kooperativo?
2. „Mi havas grandan kulpon: tiel mi vivis de mil naŭcent kvardek kvin, por ke socialisma lando fariĝu el tiu ĉi lando, ke intertempe mi ne akiris diplomon." Jene plendas unu el la rolantoj de la romano. Kiel li nomiĝas?
3. Unu el la rolantoj, Benĉjo, suferas perfortan morton. Kiu kaŭzas ĝin, kaj kiamaniere?

Kiel ĉiam, oni respondu minimume du el la tri demandoj. Limtempo por la respondoj: 1-VI-74

Ĝusta solvo de la enigmo 1973/4:

1. Ekzemple en Maŝinmondo ni trovas, ke la „registaro" parolas multe tro unuanime: neniu registaro en la mondo iam agas vere unuanime, eĉ ne la unupartiaj — kaj tiuj kun du aŭ pli da partioj ĉiam enhavas elementojn, kiuj principe kontraŭstaras ĉiun decidon aŭ opinion de la oponanta partio, eĉ dum nacia krizo, kiel en la novelo.
2. ĵaztamburisto.
3. Rilla.

Libropremion gajnis: Werner GAFKE (GDR) kaj Jerzy Banacki (Pollando).

Semajnfina flugekskurŝo el Londono al Budapeŝto

La estroj de la eksterlandaj IBUSZ fremdultrafikaj burooj interkonsilis en Budapeŝto. Temis pri la ebloj: kiel pliprosperigi la fremdultrafikon. Interalie estis pritraktata ankaŭ la demando, kiuj novaj regionoj estas proponeblaj -krom la ĝisnunaj fremdultrafikaj centroj Budapeŝto kaj la lago Balatono-, kiel refreŝiĝejoj al niaj eksterlandaj gastoj.

IBUSZ havas jam 11 fremdultrafikajn oficejojn en Eŭropo. Antaŭ nelonge estis malfermitaj novaj burooj en Parizo kaj Vieno, kaj ĉi-jare oni modernigas tiun de Moskvo.

Novaĵo estas en la ĉi-jara programo la semajnfina flugekskurso el Londono al Budapeŝto en la antaŭ- kaj postsezono. En la urbo Köln la germanaj turistoj povas sin anonci por jahtekskursa somerumo ĉe la lago Balatono. La IBUSZ oficejo en Moskvo, pro la konstante kreskanta interesiĝo pri Hungarlando, plivastigis la vojaĝprogramon, ĉi-jare rolos en la programo interalie konatiĝo kun la hungaraj urboj Győr, Sopron kaj Kőszeg.

Esperanto en la spegulo de la moderna lingvoscienco

Sub tiu ĉi titolo ni komencas publikigi novan konstantan rubrikon, Inter ĝiaj kadroj ni intencas konstante informi niajn legantojn pri la starpunkto de la moderna lingvistiko rilate Esperanton.)

LINGVO KAJ SOCIO

Pri la socia karaktero de la lingvo aperis interesa studaĵo de FABRICIUS-KOVÁCS Ferenc en la antologio „Általános nyelvészeti tanulmányok" VII. (Ĝeneral-lingvistikaj studaĵoj, vol. VII., p. 63—69).

1. La aŭtoro startas per la ĝenerale konata fakto, ke la lingvo estas socia fenomeno: ĉiu lingvo estas kreitaĵo de certa socia medio kaj la uzantoj de la lingvoj estas ĉiam membroj de certaj konkretaj socioj. Sekve: se konsideri kaj la generon kaj la funkcion, la lingvo estas kondiĉita de certa socio.

Sed kiel statas la demando en la kazo de konstruitaj lingvoj (Esperanto, interlingva; program-lingvoj ktp.)? — demandas la aŭtoro. Evidente, malantaŭ tiuj lingvoj ne estas simila konkreta socia fono, kia en la kazo de naturaj lingvoj. Sed tiam ekestas la demando: kiomgrade tiaj „lingvoj" estas konsidereblaj kiel lingvoj, se la „socieco" estas kriteria elemento de la ideo „lingvo"?

2. Ĉiu lingvo estas signosistemo ebliganta la reciprokan informaĵ-interŝanĝadon inter homoj laŭ akustikaj respektive optikaj kanaloj. Se oni preteratentas la kutime interpretatan kriterion de socieco, tiam ankaŭ la artefaritaj lingvoj estas konsiderendaj „lingvoj": ili estas same kreitaj kaj uzataj de homoj kiel la naturaj lingvoj. La diferenco inter la naturaj lingvoj kaj artefaritaj estas, ke la konstruitaj lingvoj estas konsciaj kreitaĵoj kaj due, ili estas kreitaj por specialaj celoj. Sed ili ambaŭ estas la samaj kiel komunikiloj de reciproka informaĵ-interŝanĝado.

3. Konservante la kriterion de socieco, la aŭtoro plivastigas ĝiajn limojn kaj enkadras en ĝin ankaŭ la grupon de tiuj individuoj, kiuj uzas inter si iun konscie kreitan signosistemon, sendepende de la nombro de uzantoj (la aŭtoro supozas ke Esperanton uzas 7—8 milionoj da homoj). La esenco de la „socia karaktero" estas, ke la fenomeno ne estu individua, sed kolektiva.

KONKLUDE

surbaze de tia koncepto (cetere science perfekte pruvebla) Esperanto estas *en* kaj *ne ekster* la socio, same kiel ĉiuj aliaj lingvoj ĝi estas socia fenomeno kaj same kiel ĉiuj aliaj lingvoj ĝi havas sian socian fonon.

4. Daŭrigante, la aŭtoro konstatas ke dum sia funkciado (= parolo, teksto) la lingvo estas kaj la rimedo kaj la rezulto de interpersona, reciproka aktiveco: ĝi estas kaj la funkcio, kaj la produkto de la kolektiva intelekto. Sed la parolaktiveco estas ne nur intelekta sed ankaŭ psika fenomeno: en ĝi interrilatiĝas ne nur du intelektoj sed ankaŭ du psikoj. Tiel la komponentoj de la parolaktiveco estas kaj intelektaj, kaj afekciaj, kaj volaj.

Dum la parolaktiveco interŝanĝiĝas psikaj enhavoj, kondiĉitaj de spertoj. Siavice la spertoj estas segmentoj de certa socia psiko, karakterizata ĉiam de certa konkreta kulturo. Koncerne ĉi kulturon la aŭtoro ne revenas plu al la problemo de konstruitaj lingvoj — kvankam ĝuste en tiu ĉi rilato aperas ekscita por ni la demando: kio anstataŭas la konkretan, tradician, etnan kulturkomponenton en la kazo de internacia lingvo?

Al tiu demando ni trovos respondon en aliaj lingvistikaj verkoj, pri kiuj ni revenos en la sekva numero.

d-ro István SZERDAHELYI

INTERESAĴOJ

Ondoj de gravitado. Estas konate — ankaŭ Fernandez parolas pri tio en siaj „senĝenaj dialogoj" —, ke oni, ŝajne, malkovris la gravitajn ondojn, jam antaŭe supozeblajn laŭ la relativec- teorio de Einstein. Ilin demonstri estas tre malfacile pro ilia malforta efiko, sed la usonano *Weber* konstruis ekstreme sentivan aparaton por ilia detekto: ĉi tiu konsistas el aluminiaj cilindroj, kies moviĝon signas piezoelektraj detektoroj. De tiam daŭras la diskuto, ĉu la ricevitajn signojn fakte produktas gravitaj ondoj devenantaj el la mezo de nia galaksio. Kelkaj kontraŭdiroj ŝajnas refuti tion. Lastatempe sovetaj scienculoj konstatis interdependon de la Weber-ondoj kaj la sun-aktiveco: laŭ ĉi tio la Weber-ondoj prezentiĝas tiam, kiam la pliiĝinta sun-aktiveco sendas rapidajn atompartiklojn al la Tero, kaj ĉi tiuj influkas (indukas) la magnetan fortospacon de la Tero. Interdependon supozas ĉi tiuj esploristoj ankaŭ inter la Weber-ondoj kaj la kosma radiado, tamen ne ekskludante la eblon, ke la Weber-ondoj estas fakte ondoj gravitaj.

Savi la abelreĝinon. Se oni ĉiujare ŝanĝas la abelreĝinon en la abelujo, per tio pligrandiĝas la mielrendimento de la abelfamilio. Sed la abeloj ne ĉiam akceptas la novan reĝinon: kelkfoje ili mortigas ŝin. Sovetaj esploristoj konstatis, ke la sintenon de la abelfamilio kontraŭ la nova reĝino oni povas antaŭvidi per la karaktero de la sonoj, kiujn aŭdigas la familio per flugilvibrigo. Sono super certa frekvenco signas koleron. Oni do enmetas la reĝinon en dratkaĝeto kaj ĉi tiun oni forigas nur, se la frekvenco de la flugilvibra sono ne fariĝas minaca.

kvk

Balatono —nia granda trezoro

Balatono estas la plej granda lago de Hungario kaj samtempe de la tuta Meza Eŭropo. Ĝia akvosurfaco estas meze 600 km^2, ĝia longo 77 kilometroj, la larĝo varias inter 14—15 kilometroj, ĝia meza profundo estas 3—4 metroj; ĉe la urbo Tihany 11 metroj.

La somera suno facile varmigas la neprofundan akvon de la grandsurfaca lago, kiun ĉe la suda bordo limas malaltaj montetoj kaj ebenaĵoj, ĉe la norda pitoreskaj bazalt-montaroj, sekve ĝi tre taŭgas por ripozo, krome ĝi ankaŭ prezentas eksterordinarajn eblojn por akvaj sportoj, interalie ankaŭ por velado.

La kvalito de la akvo de Balatono ankoraŭ ĉie estas unuaklasa, kaj pro tio ĝia vizitateco kreskas de jaro al jaro. Sekve de la kreo de la antaŭkondiĉoj, konformaj al la pretendoj de la nuntempaj homoj — modernaj ripozdomoj, hoteloj, kampadejoj, restoracioj, amuzejoj ktp. — ripozas, ferias kaj amuziĝas tie centmiloj. Dank' al niaj evoluantaj internaciaj rilatoj, nuntempe jam dekmiloj de eksterlandaj turistoj ĝuas la belecon de la Balatona pejzaĝo, gustumas ĝiajn eminentajn vinojn kaj portas kun si la agrablan memoron de la tagoj, pasigitaj ĉi tie.

Por atingi, ke tiu ĉi granda trezoro de nia lando, la kares-akva Balatono ankaŭ estonte estu frekventata de centmiloj, serĉantaj ripozon kaj refreŝiĝon, estas nepre necese gardi la kvaliton de ĝia akvo, teni ĝian akvonivelon en la dezirinda alteco, reguligi ĝian bordolinion, forigi la ŝlimon, akumuliĝintan en iuj partoj, kaj konservi ĝian valoran flaŭron kaj faŭnon, por ke Balatono ne havu la saman sorton, kiel kelkaj valoraj lagoj de la mondo.

La solvo de tiuj taskoj okazas laŭplane, surbaze de kompleksaj prikonsideroj. En la jaro 1776 oni faris planon por malaltigi la akvonivelon, kiu estis multe pli alta, ol la nuna, kaj ankaŭ la akvosurfaco estis pli granda. Ĉe la elfluejo de la rivero Sió en 1863 estis konstruita kluzo kun kapacito de 8,5 m^3/sek., kaj ankaŭ la supra parto de la rivero Sió estis ordigita.

La utiligo de Balatono, kiel ripozloko, komenciĝis ĉ. la jaro 1880, kaj lige kun tio estis necese konstrui kluzon de 50 m^3/sek., kaj konforme al tio



La Balatono ĉe la duoninsulo kaj abatejo de Tihany

ankaŭ la rivero Sió estis pliampleksigita. Tamen, la pliampleksigo de Sió pro la unua mondmilito estis finita nur en 1930.

La kluzo de Siófok dum la dua mondmilito estis detruita; oni rekonstruis ĝin en la nuna formo en 1947, kune kun la porŝipa kluzo.

Apud la lago Balatono estis konstruitaj 17 havenoj, kiujn kunligas ŝipovojoj de entute 123 kilometroj.

Ekde la fino de la pasinta jarcento la interesatoj konstruis periodajn kaj alimetodajn borddefendilojn, kaj ankaŭ bordmurojn por gardi la surbordajn terenojn kaj ripozdomojn. La tuta longo de la plenkonstruitaj borddefendiloj nuntempe jam ampleksas pli ol 60 kilometrojn.

La lago kaj ĝia baseno formas nedisigeble kunapartenantan akvomastruman unuon, kies hidrologiaj procezoj estas formataj fare de la naturaj dispozicioj de la regiono, kaj fare de la intervenoj de la homo. *Ajna ŝanĝiĝo de la tuto de la hidrologia bilanco aŭ eĉ parta modifiĝo de iuj ĝiaj komponentoj interne de la akvomastruma unuo influas ne nur la kvanton de la akvotrafiko, sed povas kaŭzi ankaŭ modifiĝon de la akva vivo de la lago.*

Sen homaj intervenoj Balatono nuntempe prezentus tute alispecan bildon. Sen artefarita elfluejo formiĝus lago kun surfaco de 1100—1200 km^2, kun akvonivelo je 1,5 metroj pli alta kaj kun nivelondado de 3—4 metroj. Nome, la plurjara akvobilanco de la lago estas pozitiva. Tio signifas, ke post longa tempo la lago havas signifan kvanton da superflua

akvo, eĉ krom la perdo per la akvosurfaco. Komence de la historiaj tempoj la natura nivelo de elfluado povis esti je 3—4 metroj pli alta, kaj ĝiajn originajn hidrologiajn procezojn difinis la natura ter-reliefa sojlo.

La naturaj bazaj cirkonstancoj de la hidrologiaj procezoj, formiĝintaj kiel konsekvencoj de la baseno kaj klimato, esence ŝanĝiĝis nur kiam la terkulturo komencis rapidan ekspansion. Ĝis la 17—18-a jarcento desur la baseno, kovrita per praarbaro kun densaj subvegetaĵoj, en formo de surfaca fluado atingis la lagon malpli da akvo kaj sedimento; la ampleksaj kanaroj, boskoj kaj la marĉo Kiŝbalaton (Malgranda Balatono) per sia vaporelspirado konsumis pli da akvo, ol la nuntempa surborda vegetaĵaro.

Dum la lastaj jarcentoj pro la plimultiĝo de la loĝantaro pliampleksiĝis la agroj kaj estis detruitaj la arbaroj, kaj sekve de tio pli granda parto de la pluv- kaj neĝakvo akumuliĝis sur la tersurfaco, kaj tiu pli granda kvanto ankaŭ defluis pli rapide; tial, por eviti la damaĝojn faritajn de la akvo, oni devis kompletigi la naturan akvoreton per artefaritaj kanaloj. Per la senakvigo de la marĉaj, malsekaj teritorioj malpliiĝis la akvokonsuma flaŭro. La surfaca akvokvanto, fluanta en la lagon, laŭgrade kreskis pro la ekonomia utiligo de la ĉirkaŭaĵo, kaj fariĝis loke pli koncentrita.

Tiamaniere la ekvilibra akvonivelo tre eble estis je 1—1,5 metroj pli alta ol la nuntempa, kaj la nivelondado verŝajne atingis 2—2,5 metrojn. La ŝanĝiĝo de la akvonivelo tiutempe ankoraŭ ne minacis gravajn valorojn sur la borda strio, tamen, por utiligi novajn teritoriojn, oni konsideris necesa la malaltigon de la ekvilibra akvonivelo je 1—1,2 metroj.

La novaj ekonomiaj bezonoj la ekvilibran akvonivelon malaltigis al +75 centimetroj, kaj nuntempe jam nur 40—50 centimetra nivelondado estas tolerebla sen signifaj damaĝoj.

La baseno reguligas la akvokvanton de la lago en jaraj periodoj konforme al la ritmo de la vetero. La tendencoj de la homaj intervenoj modifis la kvoton kaj la tempan dividiĝon de la falinta pluv- kaj neĝakvo, atinginta la lagon. En nia epoko — kun la evoluo de la grundodefendo — tiu tendenco montras la malpliiĝon de la enfluanta kvoto. Kvankam la plurjara akvobilanco de la lago estas pozitiva, tamen, pro la supre eksplikita tendenco kaj la neeviteblaj akvoelfluigoj — ĉi lastajn neprigas la dumjara neegala tempa dividiĝo de la pluv- kaj neĝakvo — kreskas la nombro de la jaroj, havantaj negativan bilancon. La saman tendencon montras ankaŭ la konsumo de la akvouzantoj, kvankam tiu ĉi efiko postrestas al tiu de la naturaj ŝanĝoj, tamen ĝi pliigas la akvodeficiton. La negativa akvobilanco manifestiĝas en la formiĝo de ĉiam pli granda akvoludo kaj en la kresko de la ofteco de la akvodeficito.

Haveneto de Tihany

Ĉi tie jam anoncas sin ankaŭ la kvalitaj konsekvencoj de la kvanta ŝanĝo. La bordaj strioj, perdintaj la akvon, estas malutilaj kaj estetike, kaj higiene; en la malprofunda akvo rapide kreskas la kano kaj ceteraj akvaj vegetaĵoj. Pro la kemiigo de la agrikulturo tute senpere senteblas la efiko de la alikvalita akvo: la pliiĝo de la enakva nutrokvoto akcelas la maljuniĝon de la lago.

La neĝakvoj kaj someraj pluveg-akvoj, kurantaj desur la baseno en la lagon, trenas kun si grandan kvanton da humo. Tio signifas damaĝon kaj por la lago, kaj por la baseno. La ŝlimiĝo de la baseno tamen ne ŝuldiĝas al la sedimento, kuntrenita de la baseno, sed pere de biokemiaj procezoj ĝi akceliĝas ankaŭ en la lago mem.

Rezulte de la ekologiaj ŝanĝoj jam estas rekoneblaj la danĝeraj antaŭsignoj de la biologia vivcirklo.

La ekzameno de tiu ĉi komplika problemaro kaj la plenumo de la necesaj aranĝoj jam estas farataj.

Rezulte de tio, post kunakordigo de la interesoj de la agrikulturo kaj akvomastrumado, pretiĝis la bazaj planoj de grundodefendo kaj baseninstalo. La reguligo de la akumulejoj de la subgrunda akvo okazas konstante de jaro al jaro. Dank' al la aranĝoj, servantaj la defendon de la akvokvalito, konsiderinde malpliiĝis la malpuriĝo de la akvo.

La plenumo de la planoj, ellaboritaj surbaze de multflankaj esploroj kaj analizoj, pretendas kunordigitan laboron, ja nur tiel eblas utiligi efike la disponeblajn intelektajn fortojn por konservi nian grandan naturan trezoron, la „hungaran maron".

D-ro Ferenc *László*

Lajos Târkony

REVUO DE REVUOJ

LA TORNISTRO estas novnaskita gazeto „por instruo kaj distro", eldonata de la Argentina E-Instituto; ĝia ĉefa viviganto ŝajnas Ergoto de Bonaero, konata per siaj humuraj historietoj ofte aperantaj en HDE. En la gazeto oni trovas ne malmulte da legeblaĵoj, precipe humuraj, sed ankaŭ artikolon pri la tabako, kun aludo al ties malutila efiko al Zamenhof (J. Scolnik), specimenan tekston el la verko „La krimo de la milito" de J. B. Alberdi, pledanta por Unuiĝintaj Ŝtatoj de la Homaro (evidenta revo ĥimera, dum ekzistas socioj hom-ekspluataj), eĉ tradukon de poemo tre revolucia el portorika poeto V. R. Nietzce. Ni povas ekkoni ankaŭ la tekston de peronista marŝo esprimanta tre sangvinajn esperojn; ni ne povas kontroli, kian bazon ĉi tiuj havas kaj povas nur esperi ilian realiĝon. Iom mi miras, kial ne uzas la gazeto la inventaĵon de la bona olda Gutenberg; ĉu ĝi jam eksmodiĝis?

Kun artikoloj aperintaj en SENNACIULO ne malofte mi diskutis ĉi-loke; oni eĉ riproĉis min, kial mi okupiĝas tro multe pri tiu gazeto, dum aliajn mi eĉ ne mencias. Nu, el mia rubriko mi ne volas fari simplan gazetlistigon tute ne interesan, do mi mencias nur gazetojn, en kiuj troviĝas io, kion indas citi aŭ endas refuti. Koncerne Sennaciulon, ĝis nun la dua eblo estis kutima, sed nun (dec.) mi devas fari aproban mencion pri la artikolo „Klasbatalo?" de *Riĥter*. Ĉiu leganto de la gazeto devus ĝin ne nur legi, sed ankaŭ lerni parkere, por povi rezisti al la kapitalista manipulado, tiel klare prilumata de la artikolo. Tre leginda estas ankaŭ la artikolo de *Levi*, kiu montras la erarigajn konsekvencojn de la formala logiko. Ĝoje mi vidis, ke *Skeldido* ĉi-numere restriktis sian kunlaboron al priparolo de lingvaj demandoj. Ĉi-artikole li eĉ estas prava koncerne la liternomojn.

MEDICINISTAJ INFORMOJ, kvankam anti-Gutenberga, ĉiam enhavas interesaĵojn ankaŭ por laikoj, ekzemple en la novembra numero la artikolon pri la 25 jaroj de la Monda Saneca Organizo kaj pri la rezultoj de ĝia laboro en la evoluantaj landoj. Ĝi enhavas ankaŭ tre amuzan kuracist-anekdoton.

En EĤO (1973.4.), eldonata de Dana E-Asocio, mi trovis artikoleton, kiu vigle kaj ĉarme rakontas metodon kaj praktikon de sekso-klerigo en infan-ĝardeno. Ĝi estas tre leginda.

EN DIA REGNO (1973.10.) mi trovis originalan poemon de *W. J. Downess;* la gazeto publikas ankaŭ muziknotojn por ĝin fari kantebla. Laŭ la poemo Kristo ne estus mortinta por la tuta galaksio, sed li mortis nur por la teraj homoj, eĉ por la plej pekema el ili. Mi miras pri la informiteco de la poeto, sed se li esprimis nur sian deziron, mi trovas lin ne tre grandkora.

En STARTO, organo de Ĉeĥa E-Asocio, (1973—7.) aperis lastatempe batalskribaĵoj kontraŭ la vorta pliriĉiĝo de E-o el la plumo de *Pechoĉ* plurfoje kaj el tiu de *K. Piĉ* antaŭnelonge. Mi ankaŭ menciis tiujn artikolojn kun kelkaj diskutvortoj. Nun ĝoje mi povas konstati, ke Starto ne fariĝis nesto de simplistoj: jam *E. Felix* (numero 35.) skribis pri la problemo objektive kaj saĝe, kaj nun *J. Korinek* dediĉas al ĝi detalan pritrakton kun la titolo: „Neologismo-fobio kaj neologismo-manio". Kun lia artikolo mi povas konsenti preskaŭ en ĉiuj punktoj, nur lian proponon, ke ĉe sinonimoj enuziĝintaj la Akademio baldaŭ rekomendu, kiun formon elekti el ili, mi trovas apenaŭ efektivigebla: la rezulto de la akademia voĉdono verŝajne estus, ke neniun.

ESPERANTISTO SLOVAKA (1973. 9—10.) iras vojon de ĝojinda evoluo. Ĉiam estas agrabla sento, se nacian E-an gazeton oni ne flankenmetas post trafoliumo, sed post duonhoro oni rimarkas, ke oni ankoraŭ ĉiam legas ĝin. Jes, ĉar eĉ la du paĝojn da poemoj oni nepre legos ĝisfine, se oni komencis la legon. Se nur la gazeto ne estus anti-Gutenberga.

—

LA SUDA STELO (1973. 4—5.) avertas, ke ĝi ĉesos aperi provizore, ĝis reguligo laŭ la novaj leĝoj. Ni tre esperas, ke tiu reguligo okazos tre baldaŭ. Mi rememoras nome pri okazo, kiam la kongreso havis preskaŭ ruinigan efikon al la landa movado (Helsinki, 1922). Cetere, legindaj estas en la numero la raportoj pri diversaj kongresaj aranĝoj. — En la Lingva Angulo troviĝas diskuto inter *H. Seppik* kaj *A. Sekelj* pri la skribo de la propraj nomoj en E-o. Mi konsentas kun *Seppik:* oni skribu ilin laŭ ilia originala formo. Kelkaj kialoj laŭ mi: 1. Propra nomo estas proprajo, kvazaŭ fabrikmarko, kiun neniu rajtas kripligi (multaj nomoj eĉ estas diverse skribataj, kaj tio, precipe ĉe oftaj nomoj, bone servas por distingo: ekzemple en la germana *Meier, Meyer, Maier, Mayer,* en la hungara *Kovács, Kováts, Kovách).* 2. Fonetika skribo estus eble allasebla, se E-o havus literon por ĉiu sono. Sed, se mi trovas *Bem,* ĉu tio estas nomo de polo (Bem) aŭ de germano (Böhm)? Kio estas *Kiri?* Ĉu *Kiery,* aŭ *Curie* aŭ *Küry?* PIV inklinas, verŝajne sub la efiko de SAT, al E-fonetika skribo, sed ĝi fiaskis ĉe la nomo de *Hugo,* ĉar kiu rekonus en *Igo* la grandan romantikiston? 3. La rusaj esperantistoj ne transskribas fonetike la proprajn nomojn, sed simple anstataŭigas la cirilajn literojn per iliaj E-aj ekvivalentoj: *Petr, Orel* (ne Pjotr, Arjol). 4. La japanoj skribas la latinskribajn nomojn latinskribe meze de la japanlitera teksto, kaj por la transskribo de la japanaj nomoj en latinajn literojn ili mem ellaboris sistemon. 5. Tradukante el cirillitera teksto en lingvon latinliteran oni trovas transskribitajn nomojn, pri kiuj oni simple ne povas diveni, kiel ili aspektas en la originalo, kaj se temas pri nomo de aŭtoro de elserĉota artikolo, kiel, sub kia formo oni serĉu ĝin en biblioteka katalogo.

En THE BRITISH ESPERANTIST mi legis noveleton de *N. Roberts;* ĝi montras talenton kaj vekas esperojn. Tre mankis por mi kontribuoj de *D. Quirke* kaj *M. Boulton.*

La revuo PACO (1973. 4.), en la eldono de Germana Dem. Resp., estas ne nur riĉa, sed ankaŭ bela, vere luks-aspekta. Mi ellevas el la embaraso de riĉo longan *Jevtusenko*-poemon en *Gusev*-traduko kaj la artikolon de *Á. Rátkai,* laŭ kiu Marx kaj Engels opiniis, ke nacia lingvo ne taŭgas por la tuta homaro.

En la BOLETIN, eldonata de la Hispana E-Federacio mi ĝoje vidis, ke *F. de Diego,* kiu brilas ankaŭ per traduko de *Hernandez*-poemo, enkondukis la rubrikon „Revuo de la Revuoj". Espereble nia konkurso levos la nivelon de ĉi tiu verkaĵo-speco.

FRIGYES KARINTHY

Mahlzeit kaj Zaturek

Ŝatata verkisto-kolego pola rakontis al mi jenon:

Lia samlandano, laŭnome Zaturek, restadis en Berlino kiel modesta vojaĝanto. Tage li sola promenadis, vizitis muzeojn kaj ĝuis la plenan fremdecon, kies ĉarmon pliigis, ke eĉ unu vorton li ne parolis germane kaj devis interkomunikiĝi laŭ la primitiva maniero de Robinson kaj Vendredo.

Por tagmanĝo li elektis modestan restoracieton. Aliflanke de la tablo sidis germana maljunulo de afabla vizaĝo.

Ili tagmanĝis silente. La germano finis la manĝadon unu minuton pli frue, stariĝis, klinis facilmove la kapon kaj diris: *Mahlzeit.* Ankaŭ nia polo stariĝis, pensante, ke se la germano estas tiel ĝentila, ke li prezentas sin en publika restoracio, ankaŭ li ne devas esti malafabla. Ankaŭ li stariĝis kaj prezentis sin: *Zaturek.*

Ankaŭ sekvatage ili manĝis ĉe la sama tablo. La germano ree stariĝis unu minuton pli frue kaj diris kapobalance: *Mahlzeit.*

Zaturek iomete miris: ĉu la germano forgesis, ke ili jam foje prezentis sin reciproke, aŭ ĉu estas kutimo ĉi tie prezenti sin refoje je ĉiu okazo? Nu, li konformiĝis al la kutimo, stariĝis kaj diris: *Zaturek.*

Kiam tiu ĉi sceno ripetiĝis ankaŭ triafoje, li rakontis tiun strangaĵon en la pensiono al siaj samlamdanoj, kaj demandis, ĉu sinjoro Mahlzeit laŭ ili estas ordinara germana tipo aŭ ia ekstravaganculo. Kompreneble ili ridegis, kaj lin informis, ke *Mahlzeit* ne estas nomo, sed ĝentila esprimo, kies proksimuma senco estas „je via sano". Nia polo tre hontis, eĉ ruĝiĝis pro la penso, kion povas pensi pri li la germano. Oni devas tion ripari.

Tagmeze li eniris ĝustatempe la restoracion, manĝis ekscitite kaj rapide, kvazaŭ konkurse kaj ankaŭ sukcesis fini la tagmanĝon du minutojn pli frue. Tiam li stariĝis, klinis sian kapon kaj triumfe kaj nobele diris: *Mahlzeit.*

Nun la germano ruĝiĝis iomete, evidente pro la ĝojo, kiel inteligenta viro estas tiu polo, ke jen, li honoras lin per la saluto kutima en lia gepatra lingvo. Li volis tuj montri, ke ankaŭ li scias, kio estas internacia komplezemo. Do, li stariĝis, klinis sin, kaj kun tolereble bona prononco salutis per la lernita vorto: *Zaturek.*

Tr.: *Dr. I. Nagy*

Grekoj en Hungarlando

„Grekaj emigrintoj konstruis etan Greklandon en la koro de Hungarlando" — diris la komunuma partisekretario Lazos Jorgos *al la riportisto de „Népszabadság,* Tamás Kéri. *El ĉi ties riporto ni prenas interesaĵojn pri greka-macedona-hungara vilaĝo havanta 1600 loĝantojn kaj nomata* Beloiannis, *laŭ la murdita heroo de libereco.*

La vilaĝon direktas 27 konsilianoj, el kiuj ses estas hungaroj. En la 7-membra Plenumkomitato troviĝas nur unu hungaro, la prezidanto. Li diris, ke oni ĉiam reelektas lin, sed ne pro tio, ke la komitatanoj povas greke „preterparoli" super lia kapo"; li ĉion komprenas ja greke. La interesiĝo pri la publikaj aferoj estas granda; ne malofte ili tenas kunsidojn „maratonajn".

La loĝantoj estas kontentaj pri sia stato. El la 420 familioj 90 laboras en la agrara kooperativo, la aliaj havas perlaboron en la loka konfekcia kooperativo aŭ en alilokaj fabrikoj. 380 familioj havas televidilon, pli kaj pli multiĝas ankaŭ mastrumaj aparatoj, fridujoj. La bona enspezo faris al ili emon ankaŭ por sociaj laboroj: ili trakonstruis la kulturdomon, betonumis la ĉefplacon kaj metis 40 000 plantojn. En ĉiu dua-tria jaro ili kolektas belan sumon por la politikaj kaptitoj en Greklando.

La gentoj ne apartiĝas: tute kutima estas la greka-hungara geedziĝo. Unu tia edzino estas Lakaki Vasiliki — lia hungara edzo, János Bozóki, nomas ŝin Cili — kiu loĝas en la strato Elektra, N-ro 5. Ŝi rakontis, ke ili interkoniĝis en aliloka fabriko, kien ŝi iradis labori el Beloiannis kaj ŝia edzo el alia vilaĝo. De naŭ jaroj ili estas geedzoj, havas 8-jaran filinon kaj 4-jaran filon. „Ni klopodas — ŝi diris — ke ili bele parolu ambaŭ lingvojn, ĉar ilia patrujo jam estas Hungarlando, sed ne licas, ke ili forgesu Greklandon". Ŝi mem venis Hungarion sesjara, unu fratino ŝia vivas Greklande; ŝi vizitos ŝin, kiam la junto falos, sed vivi ŝi jam povas nur ĉi tie.

En la lerneja ĉambro troviĝas reliefa mapo de Grekio, koloraj fotoj pri Saloniko, Akropolo, Kreto, ruinoj de antikva teatro. La nepoj de la emigrintoj devas ekkoni la kulturon, geografion, historion, kutimojn de Grekio. La hungara ŝtato ĉiel helpas en tio. La pedagogoj estas mikse grekoj, macedonoj kaj hungaroj, la direktoro estas greko. La hungaraj infanoj pli volonte lernas pri la antikvaj grekoj en la societo de siaj grekaj amiketoj. Tiel same ankaŭ la grekoj la hungaran historion; okazis, ke grekineto komencis sian respondon jene: „Kiam niaj prauloj ĉe la montaro Ural...

Krom la hungaraj festoj naciaj, la infanoj solenas ankaŭ la 25-an de marto, memore de la greka revolucio en 1821. Tiel ili malkovras analogaĵojn inter la liber-bataloj grekaj kaj hungaraj, pli konkreta fariĝos al ili la historio, pli vivanta la patriotismo.

La nombro de la lernantoj estas 245. Hungaroj estas 100, sed ne ĉiam estas facile difini tiun nombron, ĉar multaj, inter ili la Bozóki-geidoj, parolas ambaŭ lingvojn kiel gepatran.

Ses infanoj el la dua klaso havis ĝuste lingvohoron macedonan. Je la demando, kial ili lernas tiun lingvon, knabo respondis:

— Por ke ni sciu legi, skribi kaj paroli macedone.

La instruisto tamen kontentis tute nur tiam, kiam knabino alkriis:

— Ĉar ĝi estas nia dolĉpatrina lingvo.

kvk

Ekstere — sur la strato

Foiro ĉe la Hortobágy-a ponto — Desegnaĵo de Antal Dévényi, naiva pentristo

Ekde la ekzistado de Esperanto ekzistas ankaŭ la problemo: kiel disvastigi nian lingvon kaj ideon.

La nuntempa stato sugestas enpensiĝi: la internaciaj rilatoj pli kaj pli vastiĝas, tamen la internacia lingvo kaj movado stagnas. Inter la kaŭzoj nepre troviĝas ankaŭ la mankhaveco de nia propaganda agado.

Hodiaŭ jam speciala sciencbranĉo zorgas tutmonde pri la reklamo. Per ĉiuspecaj rimedoj oni rekomendas al la publiko komercaĵon, aŭ ian ajn aferon. Vibrantaj neonlumoj anoncas: „Trinku brandon X — markhavan, bonkvalitan". Bunte ilustritaj prospektoj allogas: „Somerumu ĉe la marbordo, somerumu en la montaroj", „Tempo valoras monon — vojaĝu per aviadilo". Brua tamtamo hurlas: „Aromo delikata, odoro agrabla — aĉetu cigaredojn X". La reklama militiro senĉese bombardas la cerbon kaj la monujon de la publiko.

Kaj la reklamo de Esperanto?

Jen: ni organizas (abunde) renkontiĝojn, kongresojn por esperantistoj, ni aperigas gazetojn, revuojn (proksimume 100) esperantlingve, ni eldonas librojn — same por ni mem, en la kluboj la gesamideanoj glorigas Esperanton (plejparte nacilingve) kaj persiste entuziasmigas unu la alian.

La rezulto?

Ĝi estas konata. La realiĝo de nia celo ŝvebas ie en la fora futuro.

Por akiri novajn adeptojn, ni devas direkti la propagandon al la neesperantistoj. La venko de la internacia lingvo multe dependas de tio, kiel ni kapablas ĝin rekomendi.

La hungara Esperanta movado ĝoje heroldas, ke — helpe de Tutlanda Konsilio de Sindikatoj — ĝi prenis en la manojn gravan propagandilon. En la eldono de HEA — redaktata de Mihály Gergely — aperas hungarlingva monata revuo: „Eszperantó Magazin". Ĝia subtitolo *„Nyelv és világ"* (Lingvo kaj mondo) *indikas ĝian profilon. Inter la aŭtoroj troviĝas eminentaj hungaraj lingvistoj, scienculoj, verkistoj kaj artistoj, Kelkaj el inter la artikoloj ĝis nun aperintaj:* La multlingveco kaj nia epoko, Gepatra lingvo de la egalrajteco, Komuna signo-sistemo, Pensoj pri la lerneja lingvo-instruado, La laborista movado kaj Esperanto, Lingvo interscienca, La lingvistikaj problemoj de „science fiction" ktp. *probable vekas intereson ĝeneralan. La ilustritan revuon kolorigas humuraĵoj, konkursoj, krucvortenigmo.* El la 24 paĝoj 4 paĝoj estas verkitaj Esperante. *Ili entenas enhavtabelon, lingvo-praktikadon, novaĵojn el la enlanda kaj tutmonda E-movado* Ĝuste tiu parto de la revuo ebligas, ke krom la hungarlingvanoj — vivantaj enlande aŭ trans nia landlimo — ĝi trovu Esperantajn legantojn, abonantojn ankaŭ eksterlande. *Eventuale ĝi povas servi kiel modelo sekvinda ankaŭ en aliaj landoj.*

En decembro de 1973 aperis ankaŭ la jarlibro de EM. Ĝia redaktoro Vilmos Benczik bone utiligis la eblon, kiun donas tiaspecaj eldonaĵoj. La hungarlingvajn tekstojn lerte varias facilaj esperantaj legaĵoj. Ĉarmaj desegnaĵoj, fotoj riĉigas la broŝuritan libron.

Ni esperas, ke nia celo realiĝos: ambaŭ nacilingvaj eldonaĵoj fariĝos efika armilo por konvinki multajn pri la neceso de komuna lingvo, pri la taŭgeco de la neŭtrala Esperanto, kiu intencas servi por la bono de tuta homaro.

Ada Császár

EKSKURSOJ DE LA TURISMA KOMISIONO (TUK) DE HEA

1. Dusemajna lingvokurso en kampadejo de Dudince (Slovakio) 7—21 julio. Pasporto: persona (ruĝa). Aliĝkotizo kun la tranoktejoj: ĉ. 400 forintoj. Detaloj ĉe TUK. Pécs.

2. Semajna turistika renkontiĝo en Besztercebánya. 20—27 julio. (Eble kune kun la antaŭa aranĝaĵo, Dudince). Aliĝo: ĉ. 350 forintoj, kun tranoktejoj kaj aŭtobuskostoj.

3. Lingvopraktiko en Kassa — Opátka aŭ —

4. en Lanĉov (ĉeĥa-morava limo). 14—27 julio. La aranĝaĵo okazos en tendaroj. Detaloj kaj sinanonco ĉe István Eőry. 9002 Győr, pf. 228.

István Örkény

Ĉu estas arboj en Venecio?

En Parizo oni trovas por si hejmon unue en iu kafejo. Mi enradikiĝis en „Café Soufflot".

Antaŭtagmeze plejparte gestudentoj sidis sur la teraso. Pleje knabinoj. Malbelaj knabinoj ĉiuj. Malbelaj amerikaninoj, malbelaj irlandaninoj, malbelaj kanadaninoj, malbelaj meksikaninoj. Nur unu ĉarma knabino sidis en la angulo de le drinkbar-tabulo. Trakuris al mi la kapon: ho, se ŝi min alrigardus. Ho, se ŝi stariĝus. Se ŝi sidiĝus apud min.

Jen ŝi stariĝis, kaj sidiĝis apud min.

— Ĉu vi estas hungaro? — ŝi demandis hungare.

— Kiel vi tion eksciis? — mi miris.

— Mi divenis — ŝi diris. — Mi estas Gitta.

— Kiel vi tion divenis? — mi demandis. — Mi vere ne komprenas.

— Instinkto — ŝi diris. — Eble pro la gazeto, kiun vi legis.

— Sed ĝi estas Paris Soir — mi diris.

— Kial tio malhelpus? — ŝi demandis.

— Ĉar ĝi estas franca gazeto.

— Kio do? — ŝi demandis.

— El tio vi ne povis diveni — mi diris.

— Kial mi ne povus diveni? — ŝi demandis.

— Ĉar ne nur hungaroj ĝin legas — mi respondis. — Eĉ!

— Mi diris, ke instinkto — ŝi respondis. — Aŭ ĉu mi ne diris?

— Jes, vi diris.

— Kion do vi volas? — ŝi ridetis al mi. — Ne estu jam tia obstinuleto.

Mi loĝis malantaŭ la „Panthéon". En la tria tago pluvegis de mateno ĝis vespero.

Surdorse kuŝante mi fumis cigaredon. Apogiĝinte sur dounkubuton ŝi kuŝis.

— Mi ankaŭ vojaĝis — ŝi rakontis. — Ho, kiel ege mi amis vojaĝi!

— Kaj kien vi vojaĝis? — mi demandis.

— Mi turneis en Hispanio, kun opereto. Tre ĉarmaj homoj estas la hispanoj.

— Kie vi ludis? — mi demandis. — En Madrido?

— Tute ne en Madrido — ŝi diris. — En la urbo Brno.

— Brno — mi diris — ne troviĝas en Hispanio.

— Vi eta geografo — ŝi diris, kaj kisis mian frunton — Jam en mia dekkvara jaro mi dancis antaŭ la sultano.

— Kiam vi estis dekkvarjara, tiam oni jam antaŭlonge forpelis la sultanon — mi diris.

— Ĉu vi scias pri io ajn! Granda mielpoto estis antaŭ li. Li nur mergis la fingron en ĝin, kaj ĝin delekis.

— Tiu ne estis turka sultano — mi diris.

— Sed li estis turka — ŝi diris kaj forkisis de mia lipo la fumon.

— Tiam Turkio jam estis respubliko — mi klarigis. — La prezidanto nomiĝis paŝao Kemal.

— Ĉu vi kredas, ke vi scias ĉion? — ŝi ofendite diris. — Prefere mi eĉ ne parolos plu.

— Sed jes, parolu plu — mi petis.

Foje ŝi malaperis. Perdiĝis ŝia spuro por du semajnoj. Mi turniĝis post ĉiu malhelblondulino, ĉu ŝi estas Gitta. Poste venis bildkarto el Berlino, pri Brandenburger Tor. „Adoras vin Gitta" estis sur ĝi skribaĉite. Poste dum longa tempo nenio. Poste alvenis ŝi.

— Iu lignokomercisto kunportis min — ŝi rakontis. — Li volis montri al mi Venecion. Fakte, ne ekzistas simila alia urbo.

— Sed, vi skribis ja el Berlino — mi diris.

Estis domaĝe diri tion. Ja, ŝi klarigis, ŝi povus ankaŭ mensogi. Se mi persistas pri tiu bildkarto, kial ŝi ne povus diri, ke ŝi estis en Berlino, ĉe sia avino? Sed ŝi konfesas Venecion. Ankaŭ la lignokomerciston ŝi konfesas, ĉar ŝi ne amas mensogi. Eĉ la duan lignokomerciston ŝi ne negas, la klienton de la unua lignokomercisto. Pere de li ŝi interkonatiĝis kun la tria lignokomercisto, kiu okupiĝis unuavice pri fago. Fakte li, kiu estis denaska veneciano, montris al ŝi la urbon. La kvara lignokomercisto komercis per pinarbo. Tiu havis propran motorboaton; per tiu ili veturis sur la lagunoj.

— Ĉu vi rigardis la palacon Doge? — mi demandis.

— Nur iomete — ŝi diris —, ĉar ĝi ne estas tre interesa.

— Kaj la preĝejon Frari?

— Ankaŭ tion nur iele-tiele — ŝi diris —, ĉar en la urbo Venecio ne tio estas interesa.

— Kio do tie estas interesa? — mi demandis.

— Tio, kiom en Venecio oni amas la arbojn — ŝi diris.

— Sed unusola arbo ne ekzistas en Venecio — mi diris.

— Ja estas ĝuste tio — ŝi ridetis enpensiĝante. — Ne ekzistas tia urbo alia en la mondo.

Poste venis aŭtuno, kaj venis militaj novaĵoj. Mi vidis ŝin pli kaj pli malofte. Kiam ŝi lastfoje estis ĉe mi, ŝi elmetis teksaĵpeceton el ŝia saketo.

— Ĉu vi parolas france? — ŝi demandis.

— Iomete.

— Oni ĝin nomas „ribouldine". Kio ĝi povas esti?

— Mi ĝuste iros al la biblioteko — mi diris. — Mi rigardos ĝin en la granda „Sauvageot".

— Kio estas tio?

— Vortaro.

— Ne tio gravas — ŝi diris. — Prefere aĉetu el tiu materialo sufiĉan por unu vesto.

— Mi ne havas monon — mi diris.

Ŝi ne tre ĝojis pro tio. Ŝi rompis al si la kapon pri ia solvo.

— Kial do vi ne petas sendi? — ŝi demandis poste.

— Ĉar tio ne eblas — mi diris.

— Via paĉjo ne havas monon? — ŝi demandis.

— Li havas — mi diris.

— Kaj tamen li ne povas sendi? — ŝi demandis.

— Tamen ne — mi diris —, ĉar estas valuto-prohibo.

— Eĉ por unu vesto oni ne povas sendi? — ŝi demandis.

— Ne — mi diris. — Ni ne havas valuton.

— Ve al ni, kompatindaj hungaroj — ŝi suspiris. — Ni denove malgajnos la militon.

Ŝi ploris dum mallonga tempo, poste ŝi foriris, kaj plu ne montriĝis. Mi atendis, mi atendis, sed Gitta ne venis. Sed mi sentis ŝian mankon. Ŝi plurfoje mensogis, ankaŭ, tre saĝa ŝi ne estis, sed la militon ni fakte malgajnis.

Tradukis: Mária FARAGÓ

György Moldova

MIAJ UNUAJ LUDILOJ

Se mi bone memoras, je la komenco de januaro 1945 Marĉjo kaj mi iris kun sledeto al Peŝto por ŝteli ludilojn. Nature, ni tiel ŝajnigis, kvazaŭ ni irus nur al la konservaĵ-fabriko por sulfuritaj persikoj. Ni sciis, ke nia patrino draŝus al ni la korpon, se ŝi suspektus, kion ni preparas fari.

Sur Körút ankoraŭ siblegis serio da mitraletoj kaj antaŭenkliniĝantaj soldatoj kun pansakoj traŝoviĝis inter la deŝiritaj dratoj. Sed en la ŝuvendejo Delka sidis ia ĉifonulo kaj ĝuste surprovis ŝuojn. Malkontente li gestis al ni per unu el la paroj.

— Ne plu estas tiuj bonaj longdaŭraj ŝuoj...

Ni unue engrimpis juvelvendejon kaj apenaŭ povis trapasi la malgrandan breĉon, kiun faris la grenad-splitoj en la ŝutro. Laŭŝajne la posedanto povis haste rifuĝi kaj aliaj ŝtelistoj ne venis antaŭ ni, ĉar sub la vitroplatoj de la tabloj brilis nedamaĝite multe da kristalvazoj, pladoj kaj, la bona ĉielo scias, kiaj juveloj.

Tio ne interesis nin. Ni ne venis de Kőbánya por tiaj sensencaĵoj. Tamen, por ne veni ĉi tien vane, ni grimpis sur la tablon kaj per niaj kalkanumoj frakasis la vitroplatojn samkiel ni kutime rompas la unuajn glaci-flakojn.

La kvina aŭ sesa vendejo, kien ni engrimpis, estis ludilbutiko tiel granda kiel kapelo. Sur la bretoj tie viciĝis ĉiuj ludiloj, kiujn ni vidis ĉe la riĉa loĝkolonio de funkciuloj: projekciilo, elektra fervojo. Sed troviĝis ankaŭ kantanta urso, streĉrisorta martelanta forĝisto kaj, kion mi plej bone estus dezirinta, granda, brila, vernisita ŝaktabulo.

Ĝis tiam nia sola ludilo estis pulĉinelo ligita al lignokulero. Nun, puŝante unu la alian, ni deprenis la ludilojn de sur la breto. Ni preskaŭ interbatiĝis pro ia lokomotivo kaj fine ĵetegis ĝin tra la fenestro, por ke neniu el ni havu ĝin. Ni tiel ŝarĝis la sledeton, ĝis metra alto, ke ni apenaŭ povis tiri ĝin hejmen.

Ĉe la rando de nia loĝkolonio ni haltis. Marĉjo min alrigardis.

— Kion ni diru al panjo? De kie ili venas?

— Ni trovis ilin.

— Ŝi neverŝajne kredos tion. Ni devas kaŝi ilin kaj poste iom post iom elpreni ilin. Tiam ŝi eble diros nenion.

Super la strato Telepi la germanoj eksplodigis la fervojan ponton. Du pilieroj restis sendifektaj kaj nur flankenfalis el siaj grandegaj kavoj.

— Ni metu ilin ĉi tien en la kavon — mi diris —, ĉi tie neniu trovos ilin.

Ni demetis ilin laŭvice kaj laste mi kuŝigis la ŝaktabulon kaj ankaŭ ĉirkaŭvolvis ĝin per mia ŝalo, por ke ĝi ne estu skrapita. Poste ni kovris la ludilojn per pakum-papero kaj ŝutis teron sur ilin.

Je la komenco de februaro la Nacia Helpservo portis nin al la provinco. En unu lito loĝis Marĉjo kaj mi kune kun du ceteraj infanoj, kiujn ni forpelis. Kaj ni kunpremiĝis sub la kovrilo kaj babilis: kiam ni hejmeniros ni elprenos la ludilojn kaj ni diros, ke ni ricevis ilin de la Nacia Helpservo.

Tuj kiam ni alvenis, ni kuregis al la ponto sed niaj piedoj radikis en la teron pro malĝojo. Oni ankoraŭ ne rekonstruis la ponton sed la du sendifektajn pilierojn oni jam suprenlevis kaj ferturoj pezaj milionon da kilogramoj staris sur mia kompatinda ŝtelita ŝaktabulo, en kiu de tiu tempo kunklakiĝas la figuretoj kiam supre trajno transiras la ponton.

Tr.: ÉVA kaj BERNARD GOLDEN

Eli Urbanová

Ne multe mankis

Ne multe mankis
kaj mi kredis,
ke de prauloj
ni heredis
instinkton, kiun
pro ornamo
ni poezie
nomas amo.

Ne multe mankis
kaj perverso
jam daŭre premis
en la verso
per siaj krudaj
ung' kaj dento
la lastajn restojn
de la sento.

Ne multe mankis
kaj mi, bardo,
nur mokon havis
por la ardo,
por tiu nobla,
sankta flamo:
profundenhava
vera amo...

Ne multe mankis.

Al ĉiuj esperantistoj

Kiel oni povis sperti, en la lastaj jaroj ni komencis doni ian indan interesan karakteron por ĉiuj numeroj de Hungara vivo. La leteroj, opinioj de niaj legantoj atestas, ke ili akceptis ĉi tiun planon favore, ĉar oni ĉerpadis bone el la numeroj de HV — ekzemple — ĉe klubkunvenoj, prezentadoj, lingvopraktikado, informado por vojaĝo ktp. Ni povas rekomendi al ĉiuj esperantistoj:

3/1971 — numero pri K. Kalocsay
4/1972 — numero pri Literatura Mondo
1/1973 — n. pri Sándor Petőfi, poeto
2/1973 — n. pri Gyula Illyés, poeto
3/1973 — n. pri Budapest
4/1973 — n. pri S. Szathmári, verkisto
1/1974 — n. pri la originala Esperanto-prozo
2/1974 — n. pri Hungario kiel inda turisma celo
3/1974 — n. pri la originala Esperanto-poezio
4/1974 — n. pri la hungara ekonomia vivo
5/1974 — n. pri la originala Esperanto-dramo
6/1974 — n. pri la hungara scienco

Redakcio de HV

Lajos H. Barta

Historietoj kaj historio

Hundoj de Szigliget

En Szigliget la hundoj estas mildaj, tiel mildajn hundojn vi ankoraŭ neniam vidis, sinjoro, eĉ se vi travojaĝis la tutan mondon. Ĉi tie de dudek jaroj hundo ne mordis homon... Nur rigardu, ili sidadas, trankvile, kvazaŭ ili ridetus, se ili stariĝas, eĉ tiam vi ne timiĝus de ili, ili nur frotas sin al la homoj, ili interkonatiĝas. Mi diras, sinjoro, ne ĉar mi loĝas ĉi tie, mi diras, ke jen estas la plej bela loko de Balaton. Se mi bone scias, antaŭ jardekoj la verkisto Károly Eötvös diris, ke ĝi estas la plej bela angulo de la mondo... Jes, tie, tie, tiu granda konstruaĵo, tiu estis la kastelo de la grafoj Eszterházy. Kaj nun ĝi estas la kreo-domo de la verkistoj, havas tridek du ĉambrojn, oni, tio estas fakto, ne tre povas vidi, kia estas la konstruaĵo, ĉar ĉiuflanke ĝi estas barita kiel ia karcero.: du metrojn alta ŝtonmuro iras cirkaŭe, ĝiaj ses pordegoj estas ŝlositaj-fermitaj, sed kredu al mi, ke ene ĝi estas belega! Tie troviĝas banĉambroj kun verdaj kaheloj, krome tie estas tia praparko, sinjoro, ke ankaŭ la eksterlandanoj nur rigardadas... Antaŭlonge estis tie multaj hundoj, sinjoro. Tuta bredejo da hundoj. Ĉi tie vivis la grafo Eszterházy, ĉi tie ĉio apartenis al li, tamen li mem loĝis ne multe ĉi tie, pli ofte li estis en Vieno, en Svislando. Sed li havis parencon, idioton, kiu loĝis ĉiam ĉi tie, kaj li havis la manion bredadi luphundojn. Li gardis la hundojn en kaĝego, kaj unufoje en la jaro — oni ne scias pro kio, ankaŭ tio apartenis al liaj idiotaĵoj —, li ellasis ilin en la vilaĝo Szigliget. Tiaokaze la hundoj garditaj mallibere — liberiĝis, fariĝis sovaĝejaj, ŝaŭmis ilia buŝego, ili mordis la homojn. La vilaĝanoj sendis deputacion al la notario: la hundoj mordadas la homojn, eĉ la infanojn! La notario vizitis en la kastelo la idioton. Tiu ĉi disponis jene: kiu estos mordita de la ellasitaj hundoj, tiu ricevos kompenspagon; li pagos pro la vesto, pro la vundoj. La informo disvastiĝis en la vilaĝo de buŝo al buŝo, kaj, kiel strange, sinjoro, aŭdinte la informon, ĝojegis la tuta vilaĝo. Kaj ili atendis la hundojn. Kaj tiuj povruloj, kiam la sovaĝaj hundoj kun la saŭmanta buŝego trakuregis la stratojn, ekstaris antaŭ la hundoj, eĉ per bastonoj plikolerigis ilin, permesis al tiuj hundoj salti sur ilin, mordadi ilin, kaj, sinjoro, kredu al mi: eĉ siajn infanojn ili puŝis antaŭ la kolerigitajn hundegojn, por ke la bestoj mordadu ilin. Tiel estis, kaj tiamaniere ili tamen ricevis iom da mono... Sinjoro, la grafo de ĉi tie forflugis en 1944 per aparta flugmaŝino. La grafino, laŭ nia scio, mortis antaŭ jaro eksterlande. Oni diras tiel, virino diris tion, kiu vivas ĉi tie en Szigliget; ŝi estis iam vestistino ĉe la grafino, kaj nun estas kamparanino. Nun venu nur trankvile, vi povas vidi, ke ĉiu domo havas hundon, sed vidu nur, kiel ĝi rigardas, ĝi ne bojas, nur rigardas, kvazaŭ ĝi ridetus... Mi ne scias, sinjoro, ĉu mi pravas aŭ ne, sed estas strange, la homoj diras, ke ĉi tie la hundoj estas mildaj, ĉar de dudek jaroj ili ne mordis homon.

Ho, vi komplika vivo

— Vi estas ankoraŭ juna, tre juna, povas esti, ke vi ne komprenos, kion mi diros... Okazis antaŭ pli ol du jardekoj, komence de 1948... Tiam estis strangaj tempoj, mi ne scias, ĉu vi scias, kion signifas la vortoj: „koaliciaj" tempoj... kiam la registaro konsistis el diverspartianoj. Tio estis stranga mondo... Stranga. Mi naskiĝis en Budapest, en ties maldekstra parto: en Peŝt. Mi do vivis en Peŝt. En la milito mortis mia patro, mi estis dektri-jara, ni estis hejme multope, ankoraŭ kvar geknaboj kaj nia panjo, kaj manĝaĵon ni havis nur malmulte. Oni devis fari ion... min alprenis parenco el la urbeto Kiskőrös, ke dum du jaroj mi povos esti ĉe ili, senpage mi povos manĝi ĉe ili, kaj tie mi povas viziti la sepan kaj okan klasojn de la lernejo. Do mi alvenis en Kiskőrös por lerni. Mia parenco estis katoliko, ili treege akomodiĝis al la religio, mi estis do enskribita en la lernejjaro 1947—48 al la katolika bazlernejo... Mi ripetas, estis strangaj tempoj; nun mi konceptas jene: tiam „ankoraŭ ekzistis ĉio. Nin instruis ankaŭ monaĥino... Komence de 1948 — laŭ mia memoro — la monaĥino disdonis kajerfoliojn en la klaso, ĉar tio estis la tasko, ke sur ili ni skribu belajn frazojn pri Stalin... Ŝi do disdonis la kajerfoliojn, mi spronis min mem por skribi belajn frazojn, mi estis ja la una en la klaso, mi skribis do la tiam aŭdatajn sloganojn, eltrovitajn frazojn, similajn al la jenaj: Stalin estas la gardanto de la paco, li estas la patro de nia patro... kaj ankoraŭ multajn. Post duonhoro la monaĥino, kiu instruis nin, kolektis la kajerfoliojn, traleginte, kiu kion skribis, poste subite ŝi suprenrigardis, ordigis sian gladitan kaptukon kaj vokis mian nomon... Mi estis tre fiera, leviĝis, iris inter la benkoj al la katedro, al la monaĥino, ĉar mi skribis la plej bonan lecionon... La monaĥino laŭdis min, ĉar mi skribis la plej belajn frazojn pri Stalin... Poste ŝi tiris antaŭ sin la preĝlibron preskaŭ gluiĝantan al la tablo-surfaco, el inter la preĝoj ŝi eltiris sanktan bildon, sur kiu estis la krucumita Jesuo, turnis ĝin kaj skribis sur la dorsflankon: „Pro la bona respondo premie, fratino Maria..." Mi dankis por la donaco ricevita pro la belaj frazoj, kiujn mi skribis pri Stalin, poste — kun la sankta bildo en mia mano — mi ekiris al mia loko inter la benkoj... kaj, mi petas, tenante en mia mano la sanktan bildon, kiun mi ricevis pro la frazoj skribitaj pri Stalin, mi meditis: kio okazus, se la monaĥino scius, ke mi eĉ ne estas katoliko... Mi petas, tiam mi ekkomprenis, kiel komplika estas nia vivo. *(Tr: L. Kökény)*

Korespondi deziras

BULGARIO: 100 gelernantoj (15—17-j.) dez. kor. pri div. temoj. — Asenovgrado, gimnazio „Lenin" — Esperanta Rondo.

POLLANDO: Jadwiga Wilczko, Bialystok, ul. Mickiewicza 72ml (19-j. dez. kor. pri turismo k. filmoj); Wojtan Piotr, ul. Grazyny 16—36 20—605 Lublin, L.S.M. (17-j. interes. pri bk., filatelio k. sportoj); Maria Serafin, ul. Lendziona 5/b/4, 80—264 Gdansk—6, studentino pri med., interes. pri bk., numizmatiko, diskoj, parolas E, angle, pole, ruse); Jerzy Gurbala, p.k. 3, 30—967 Kraków 60. (27-j. kem. teknikisto); Irena Jagodynska, Dluzec Maly, pow. Ketrzyn, 11—432 Lankiejmy (20-j., interes. pri sporto, turismo, libroj, muziko); Wlodzimierz Malinowski, ul. Tuwima 28/6, 59—902 Zgorzelec (42-j. librotenisto interŝ. pk., bk., esperantaĵojn); Eduardo Kozyra, 50—366 Wroclaw, str. Pl. Grunwaldzki 65, DS „Centaur" (23-j. studento-veterinaro, dez. kor. pri sia fako); Agnieszka Szmytkowska, ul. Lumumby 40 kml, 80—371 Gdansk.

SOVETUNIO: 15 knaboj (16-j.) dez. kor. kun rumanoj kaj 12 knaboj (16-j.) kun jugoslavianoj, komuna adreso: Anja Vojnarovič, Esperanto, PTU—43, 343871 Avdeevka Doneckoj obl. Ukrainio; Bronius Kairis, Palanga, K. Poželos 49—10 LTSR (dez. kor. kun pensuloj solaj viroj, interŝ. bk. pm., librojn, fotojn); Sigitas Baranauskas, Klaipeda, M. Gorkio 23—3 (kor. kun 14-j. lernantoj, dez. interŝ. pm., insignojn, fotojn pri aktoroj); Birute Riliškyte, Utenos raj Saldutiskis, Litovio; Kuzmenko Lubov, Doneck 92, str. Niĵne — Kurganskaja 21, lĝ. 105 (kol. pm., bk., librojn); Vivian Kärner, sütiste 3—130, Tallinn 200029, Estona SSR (27-j. interes. pri ĉ.t., kol. pm., kaj bk.); Aleksander Vajsberg, Murmansk, obl. 184280 Monĉegorsk, abonkesto 53. (33-j. inĝeniero kor. pri ĉ.t., kol. pm. kaj bk. ilustritajn pentraĵojn); Enno Paulson, Kose-Harju, 203040 Estonio (27-j. dez. kor. pri div. temoj, interŝ. pm. kaj diskojn); Endel Pajula, Ambla, Paide raj. Estonio (28-j. kol. esperantaĵojn kaj bk.)

HUNGARIO: Szentei László kaj Kovács Kálmán, 7601 Pécs, Boszorkány u. 2. (20-j. studentoj dez. kor. ĉefe kun japanoj, aŭstralianoj k. amerikanoj).

HUNGARIO: Gáll Iván Szilárd, 3529 Miskolc, Mikes u. 32. (16-j.) Dely János, 1015 Budapest, Donáti u. 49. (interes. ĉefe pri la literaturo k. div. lingvoj); Platz Gyula, 2700 Cegléd (dez. kor. kun filatelistoj).

HUMURO

Amo. La junedzino plendas al sia patrino inter larmoj:

— Ve, panjo, mia edzo ne amas min plu.

— Kial vi pensas tion?

— Antaŭe li metis sur mian teleron ĉiam la pli grandan porcion kaj prenis por si la pli malgrandan. Nun li prenas pli multe ol li donas al mi.

— Trankviliĝu, filineto. Tio montras nur, ke dume vi ellernis kuiri.

***

Mirakloj. Du raben-studantoj (boĥeroj, baĥuroj) priparolas la eminentecon de sia rabeno.

— Ĉu vi scias — diras la unu —, ke mia rabeno scias fari eĉ miraklojn.

— Kiajn miraklojn?

— Okazis jeno. Mia rabeno ricevas leteron, ke li devas tuj veturi en la najbaran vilaĝon. Li ordonas tuj jungi. Lia edzino diras: „Je la amo de Dio, ne veturu nun. Tuj estos terura fulmotondro." Sed mia rabeno respondas: „Sarah, lasu nur al mi la aferon." Nu, li sidiĝis sur la veturilo kaj mi apud li. Kaj vidu — estis terura vetero: tondris kaj fulmis kaj hajlis. Kaj antaŭ ni hajlis, kaj post ni, dekstre kaj maldekstre de ni hajlis, nur kie ni sidis sur la veturilo, tie ne hajlis.

— Grandioze — diras la alia boĥero —, io simila okazis ankaŭ al mia rabeno. Li ricevis mesaĝon, ke li devas tuj veturi, kaj estis sabato. „Je la amo de Dio — diris la rabenedzino — vi ne rajtas veturi, estas ja sabato." Sed mia rabeno tamen veturis kun mi. Kaj vidu, antaŭ ni estas sabato, post ni, dekstre kaj maldekstre de ni estis sabato, nur kie ni sidis sur la veturilo, tie ne estis sabato.

***

Friponeco. Verd plendas procese kontraŭ Blank, ke ĉi tiu ŝuldas al li ducent forintojn, kaj ne volas la ŝuldon kvitigi. Antaŭ la tribunalo Blank asertas kaj konfirmas per ĵuro, ke li neniam ricevis de Verd tiun sumon. La tribunalo juĝas laŭ tio. La du amikoj kune foriras, kaj Blank diras al Verd:

— Jen kia abomena fripono vi estas, ke vi lasas min false ĵuri pro mizeraj ducent forintoj.

* * *

Saniga rimedo. Du amikoj renkontiĝas.

— Kio al vi, kara? Kial vi faras tiel acidan mienon?

— Lasu min trankvila. Mi havas teruran dentodoloron.

— Ĉu dentodoloron? Hieraŭ mi mem havis dentodoloron, mi iris hejmen al mia edzino, kisis ŝin dufoje kaj tuj ĉesis mia dentodoloro.

— Mi vin petas, diru, ĉu via edzino nun estas hejme?

* * *

Malsukcesa bapto. Makso lernas malbone, lia patro lin riproĉas pro tio. „Mi estas viktimo — diras Makso —, oni persekutas min, ĉar mi estas judo. Baptigu min kristana kaj transloku min en alian lernejon kiel kristanan knabon."

La patro faras tion, sed Makso plu lernas malbone. Al la patro, kiu lin admonas riproĉe, li diras: „Kion fari, patro, se la scio ne eniras en mian stultan gojan kapon?"

POR TURISTOJ



La ĉefaj vicoj de nia enigmo pritraktas la karakteran temon de ĉi numero. Ensendi sufiĉas nur tiujn vicojn ĝis la unua de junio.

HORIZONTALAJ VICOJ: 1. *Sur la Fortikaĵmonto de Buda troviĝas tiu ĉi konstruaĵo. Ĝi estas konstruita en nov-romantika stilo (1901—1902) laŭ la planoj de Frigyes Schulek. De sur ĝi vidiĝas belega panoramo de urboparto Pest.* 15. Ne akompanata. 16. Returnire. 18. Reĝa moŝto. 19. Ĉefurbo de Germana Federacia Respubliko (ne E-igita formo). 21. Faris trikoton. 23 Japana industria havenurbo. 25. Ne reaganta al fizikaj stimuloj. 27. Pasie deziranta kolekti riĉaĵojn kaj domaĝanta ilin elspezi. 28. Antaŭmalhelpi, ekz. malsanon (Radiko). 30. Ekstrema parto de akso (R). 31. Felo preparita por homa uzado. 32. Malhelkolora alta konstruaĵo (epiteto kaj substantivo). 34. Preparu ĉevalon por rajdado! 35. Antikva sistemo pri la konsisto de la materio (R). 38. Reen: Ĉiu el la du flankaj partoj de la nazo. 39. Helena filozofo kaj matematikisto (6-a jc a. K.) kiu agadis en Sud-Italio (sen o-finaĵo). 41. Samloke ekzistis. 44. Aceto, uzata kiel ĉetabla spicaĵo (radiko kun artikolo). 46. Artifiko (R). 47. OOT. 48. Esperanto Rondo Amika. 49. Montri subitan gajecon (R). 50. Post la dua fojo. 51. *De Danubo ĉirkaŭbrakata populara ripozejo, sportejo, kaj amuzejo de la loĝantoj de Budapest.* 54. Samaj konsonantoj. 56. Regiono en la Alpoj. 57. Unujara herbo (Cucumis melo), grava fruktoplanto (kun a-finaĵo). 58. Subjunkcio. 59. Multope. 60. Havenparto por en- kaj elŝipiĝo. 61. Sekvas post la unua. 63. Malalta, larĝa vazeto por trinki. 69. La radiko de la vico 18. 65. Nomo de pluraj usonaj kosmoŝipoj. 67. Fasko de falĉita greno. 68. Prezentanta kavan konturon aŭ surfacon (R). 69. Kampobrasiko. 72. Frakcio. 74. KNE. 75. La kvina monato (R). 76. Ĉefheroo de la romano „La knaboj de Paŭlostrato" (BOKA). 78. Araba virnomo. 80. Ne ŝanĝante mem sian lokon delokigis ion al si 81. Manĝaĵo el freŝaj herboj aŭ legomoj (R). 82. Bruego de fulmo. 84. Voĉe komunikas. 85. La ĉielarko havas sep el ĝi. 86. Planto kun epiginaj kuriozaj floroj. 89. Reen: Malnova mezurunuo de longo (R). 90. Nimfoj de fontoj kaj riveroj. 92. *Ĉiujara aranĝaĵo por la tutmonda merkato en Budapest. Ĝi altiras multe da turistoj.*

VERTIKALAJ VICOJ: 1. Lasi sian lokon vojaĝante. 2. Epopeo de Homero. 3. Komercaĵo laŭ hazardo aŭ neleĝa maniero. 4. Moviĝi per piedoj (R). 5. Numeralo. 6. Dolĉa trinkaĵo (R). 7. Grasa kortbirdo. 8. Pieca, celanta animan perfektiĝon per korpaj rigoraĵoj. 9. Refleksiva pronomo. 10. Numeralo. 11. Tabelvorto. 12. Konformis sin al tio, kion alia persono ordonis aŭ malpermesis. 13. Ano de ĉefgento loĝanta en norda lando (R). 14. Epiteto de metafizika sistemo. 15. *Tiu ĉi vidindaĵo estas 22 kilometrojn longa kaj situas apud la hungara — ĉeĥoslovaka landlimo ĉe vilaĝoj Aggtelek kaj Jósvafő.* 17. *Dufoje en ĉiu somero — la unuan dimanĉon de Julio kaj Septembro — oni aranĝas tiun ĉi kostuman ludaĵon ĉe la fortikaĵo de Nagyvázsony.* 20. *Tiuj ĉi teritorioj estas zorge flegataj dise en Hungario. Ili servas por gravaj sciencaj esploroj.* 22. Tabelvorto. 23. Duono de organo! 24. Numeralo. 26. Neptunio. 28. Manpafiloj. 29. Tro vulgara. 32. Rivero inter Pollando kaj Germana Demokratia Respubliko. 33. Relative granda birdo (Otis) vivanta sur stepoj de Afriko, Azio kaj Eŭropo (R). 36. Granda respubliko en Centr-Ameriko (R). 37. Specialisto de tradiciaj rakontoj pri la dioj kaj praavoj kiuj havas etiologiajn valorojn. 39. Luksa planko formita el lignaj tabuletoj. 42. Certan parton de radio-aparato, kiu servas por ricevi radiosignalojn. 42. Ĉi-momentan. 43. Komuna nomo de la grajnoj. 44. Guto de saleca likvaĵo kiu elfluas el la okuloj (R). 45. Aro aŭ sinsekvo da homoj, adeptoj de la samaj principoj de la arto. 52. Helena dio, filo de Gea kaj patro de Krono kaj de la Titanoj. 53. Etaj gutoj de la nokte likviĝinta vaporo sur la supraĵo de plantoj. 55. Adverbo. 58. Tabelvorto. 61. Rilata al verspiedo, konsistanta el unu longa aŭ akcentita kaj du mallongaj aŭ senakcentaj silaboj. 62. Diferenco inter la ŝajna kaj la vera situo de astro (R). 66. Havanta la idnaskan sekson. 68. Monkesto (R). 70. Sekse ami. 71. Kriegas en la hungara lingvo (ORDIT). 73. Maljuna per neologismo (R). 75. Prefikso. 76. Forŝovi la polvon kaj malpuraĵon per speciala ilo. 77. Unu el la kvar emblemoj de ludkartoj, ruĝa lozanĝo. 79. Regule interaranĝite. 81. Densa bruna aroma likvaĵo preparita el sojfaboj. 83. Miksita ero! 85. Refreŝiga trinkaĵo (R). 87. Kalio kaj nitrogeno. 88. Sufikso. 90. Natrio. 91. Mallongigo antaŭ la nomoj de kuracistoj.

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 73/4 (Pri Sándor Szathmári) estas:
VOJAĜO AL KAZOHINIO — LA NICA, NORDA PRISMO — VINCENZO, MAŜINMONDO — KREDU MIN SINJORO — LA PERFEKTA CIVITANO.

Libropremion gajnis: Hugo Löfgren, Lerbacksvägen 5 B, S—775 00 Krylbo, *Svedio;* A. Bongars, 5 Allée des Peupliers, 37700 St-Pierre-des-Corps, *Francio;* Visy István, 8223 Káptalanfüred, Mező Imre u. 40 *Hungario.*

Novaĵoj pri nia redaktistaro

La nomo de muzikhistoriisto d-ro. Lajos Lesznai jam longtempe estas konata inter niaj legantoj. De multaj jaroj senĉese aperas artikoloj sur la kolumnoj de nia Hungara Vivo pri la muzikarto. Nia kunlaboranto estas ankaŭ fama verkisto, kies internacie furoran Bartóklibron la Londona *Dent & Sons* libroeldonisto eldonis en la angla lingvo. La altvalora libro originale aperis en 1961 kaj nun oni presas en Leipzig la duan germanan eldonon. Ni gratulas al nia kara kunredaktoro.

Al la internacia foto-konkurso ORWO—PENTACON alvenis 37 000 bildoj de fotografistoj el 8 landoj. La ĵurio, kiun delegis la fakaj gazetoj de la koncernaj landoj, sukcesis, post longa elektado, aljuĝi la premiojn. El la hungaraj foto-artistoj la kunlaboranto de nia revuo János Eifert ricevis en la nigra-blanka kategorio duan premion per sia bildo „Danco", kaj kvaran premion per sia foto „41"; en la kolora kategorio trian premion per sia diapozitivo „Knabin-portreto".

István Eörsi

El la taglibro de tradukartisto

32. septembruaro

Hodiaŭ mi tradukis la mondfamajn *Paralelogramojn* de la bretone verkanta ejra poeto *O'Copic*, sume sep. Mi renkontis eksterordinarajn malfacilaĵojn: unuparte, mi ne scias bretone, do mi estis devigita uzi vortaron bretonan-portugalan; sed nek portugale mi scias, do mi bezonis intermeti, kiel duan ŝtupon, vortaron portugalan-germanan, poste, kiel trian, ankaŭ vortaron germanan-hungaran. La vortaroj estas pezaj, mi havas teruran lacdoloron en la muskoloj. Dua malfacilaĵo: la *Paralelogramoj* komunikas seksajn dezirojn ne tre publikigeblajn inter la hungaraj presiaj cirkonstancoj, kaj en treege laciga maniero: horizontale legante ni ricevas virinajn nomojn, vertikale virajn nomojn, kaj en la diagonalo doniĝas, laŭ ŝakĉevalaj saltoj, se tiel diri: la idea enhavo de la verkoj. Sed ankaŭ la tradukon de ĉi lastaj ege malfaciligas, ke iliaj sencoj estas inter si kontraŭaj: la aŭtoro, kiel mi legis tion en multescia komentaro, volis per tio emfazi la eblon de la libera elekto.

Mi laboris de la kvina matene ĝis noktomezo kun la subteno de termobotelo da nigra kafo kaj de bona peco da fumaĵita ŝinko. Miaj brakmuskoloj doloras, kaj se mi malfermas miajn brulumajn okulojn, ĉie mi vidas paralelogramojn saltadi en la kadro de ruĝaj kaj verdaj ringegoj. Ne povas esti, ke ĉi mia tuta klopodego vaniĝu! Ĉi tiuj versoj, kun sia fakteco kaj pasie seninspira realeco povas ja renovigi la hungaran lirikon, tro sentoplenan kaj „dikcian". Mi povas fidi nur je la revuo *Avantgarde* — mi argumentos per tio, ke tre malmultaj legas la poemojn en ŝakĉevala saltado, diagonale, kaj tiamaniere eble la riproĉebla senco restos en obskuro.

33. Septembruaro

Ĉio estas finita! Tiuj kvar dikaj, kalvaj kaj barbaj sinjoroj, kiuj laboras en la redakcio de *Avantgarde*, redonis al mi mian O'Copic kun milda riproĉo. Ili sciigis min, ke la signifo de la unuopaj vortoj estas troe tro ĉirkaŭlimita kaj preciza. Ili tamen publikigus la aĵon pro ĝiaj revoluciaj detal-meritoj, sed jen ĝuste, kio estas la tubero. Kial mi starigis ilin antaŭ tian nesolveblan moralan problemon? Ĉu fakte ili devas al mi ekspliki, ke ili — estante avangarduloj — ne povas ĝin publikigi, ĉar per tio ili torentigus sur sin la koleron de la kontraŭuloj de novigaĵoj. Per tio ili ne utilus, eĉ male, nocus al la komuna afero, eĉ al mi mem. Ili miras pri mia sentakteco kaj samtempe petas min pri ekskuzo.

34. Septembruaro

Hura! Triumfo! *Litteratura*, revuo de konservativa gusto, kvankam naŭzete, publikigos la *Paralelogramojn* Kiel saĝe mi faris, ke mi senskrupulis meti antaŭ ĝin jenan teksteton: „Tial mi tradukis la aĉan, abomenan agresaĵon de O'Copic, por ke mi imunige inokulu per ĝi nian popolon de sana senso kontraŭ la pornografa, cinika dekadenco".

0. Februembro

Komplikita estas la mondo! La revuo *Litteratura*, kun kiu mi estas ekde Septembruaro en tiel idilia rilato, redonis hieraŭ, je mia plej granda konsterniĝo, la tradukon de la epika poemo *La mortinta knabino kaj la luno*, kiu estas el la plumo de la pasintjarcenta granda vaska poeto Esprenado. Tamen, ĉi tiuj stancoj ne povas esti kovrataj de polvo en la tirkesto de mia skribotablo. Esprenado, kun la artisma zorgemo tiel karakteriza pri li, konstruis siajn dekduversajn strofojn kun la regula alterno de tri rimoj, eĉ, plimalfaciligis sian taskon — kaj per tio mian taskon — per tio, ke tiujn samajn rimojn li portis ĝisfine tra la cent dudek stancoj de sia poemo — ĉiu ajn povas elkalkuli, ke tiamaniere mi devis trovi trioble kvarcent okdek regule alternantajn rimojn. Ne, ĉi tiu laboro ne povas vane perdiĝi. La revuon *Litteratura*, nu certe, mi plene komprenas: ili sidigis min en brakseĝon, regalis per kafo kaj eksplikis, ke nuntempe ili estas konstante atakataj pro sia malprogresemo, kaj tial, el taktiko, por transira periodo, ili retiriĝas. Cetere ankaŭ mia propra intereso estas, ke oni ne brumarku min per la stampo de konservativismo. Eĉ tion ili demandis, ĉu mi ne havas ian novan O'Copic.

1. Februembro

„La fetorhaladzan ekskrementon de la kolika konservativismo flaradu do, kiu trovas en ĝi sian plaĉon!" Kun ĉi tiu akompana teksto publikigas la revuo *Avantgarde* la admirinde muziksonorajn stancojn de Esprenado.

Trad.: K.K.

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
1368. Budapest, Hungario,
Kenyérmező u. 6.
Aperas dumonate
XIV. jaro. 1974. 2-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro:
d-ro Jozefo Mátéffy
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:
D-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Császár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato ĉiun merkredon kaj la unuan kaj trian ĵaudon de ĉiu monato posttagmeze de la dua ĝis la kvina horo havas akceptotagon.
Redakcio: Budapest, VIII.
Kenyérmező utca 6.
Telefono: 141—078

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepeno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 1900. Budapest. V. József nádor tér 1) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro (ses numeroj) Ft. 48.—, al eksterlando krome Ft 9.60 por afranko.

74. 2991 Dürer Nyomda
Gyula
Indexszám: *25.377*

Por donaco

EL MISKOLC

SOUVENIER

artkvalitaj vitro-, porcelan-, ceramik-objektoj
artindustriaj produktaĵoj
regionkarakteraj popolartaj brodaĵoj
specialaj drinkaĵoj
juveloj
ornamitaj skatoloj

en
SOUVENIERBOLT
Miskolc, Széchenyi u. 40

kaj en
AJÁNDÉKBOLT
Miskolc, Déryné u. 2

DONACVENDEJOJ

BORSODI IPARCIKK KISKERESKEDELMI VÁLLALAT
bik

Konsumturist



Valoran artobjekton
porcelanon de bona marko
stilmeblon

Varojn aĉetitajn
en subraj vendejoj oni povas
sendogane eksporti el la lando

vi povas aĉeti el granda sortimento kontraŭ valuto
internacie ŝanĝebla

en niaj vendejoj en Budapeŝto
I. Hess András tér 3

Hotel Intercontinental–Hotel Gellért
VI. Népköztársaság utja 27.